



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Februaro 2018 n-ro: 26



Merhaba,

Üçüncü yılımızın Şubat sayısından sizlere merhaba. Bu sayımızda da ilginç yazılar var size en azından aşağıdakileri okumanızı tavsiye ederiz:

- Renato Corsetti'nin çok önemli bir makalesi "Dilbilimciler de insandır".
- Spiros Sarafian'ın Yunan mitolojisinden "Dedalus" ve Rolland Platteau'nun tercümesi "Kuşlar ile ilgili güzel olaylar: Leylek" adlı yazılar çok güzel.
- Luiza Carol ile Mirejo Grosjean'ın diyalogu bu sayımızda da devam ediyor.
- Ulrich Mathias'tan "Göz'ün dili" adlı çok güzel bir hikaye.
- Scivolemo blogundan "Gezegen Avı" adlı ilginç bir makale.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

Ni salutas vin el nia februara numero de la tria jaro. Ankaŭ en ĉi tiu numero estas interesaj artikoloj kaj ni sugestas al vi almenaŭ legi le jenajn:

- Tre grava artikolo de Renato Corsetti "Ankaŭ Lingvistoj estas homoj".
- Belaj artikoloj de Spiros Sarafian el la Helena Mitologio "Dedalo" kaj la tradukaĵo de Rolland Platteau "La plej belaj okazaĵoj pri birdoj: la cikonio".
- La diyalogo inter Luiza Carol kaj Mirejo Grosjean daŭras.
- Tre bela rakonto de Ulrich Mathias "La lingvo de la okulo".
- Interesa artikolo "Ĉasi Planedojn" el blogo Scivolemo.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Tago de la Gepatra Lingvo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Ankaŭ lingvistoj estas homoj	4
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
La Esperantisto de la Jaro	5
Pri la Esperanta Unesko Kuriero	6
Vi ne kredu je viaj...	7
Dedalo	8
La viro kaj la hundo	10
Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN (parto 2)	11
Inteligenta Patrino	12
Pri novaj vortoj en Turka Lingvo	13
Kaze de la gripo kaj virusinflamoj	14
La plej belaj okazaĵoj pri birdoj	15
La Eŭropa Lingvo	16
La lingvo de la okulo	18
Ŝercoj	19
Kurcvortenigmo	20
Rakontoj pri Afanti	21
El ludilo medicina instrumento	21
Demisiis la prezidanto de TEJO	21
El la libro de "Dao de Jing" (18)	22
Mallonga Historio de Filozofio (25)	23
Dankon Amiko (13)	24
Ĉasi Planedojn	25
Iom pri vortkunmetado	27
Poemoj de Nazaré Laroca	29
Versoj Ironiaj (poemoj)	29
Neĝa Homo (poemo)	29
Esperanto Kurso (25)	30
Esperanto prezento en Turka Liceo	31
Veganarto	32

Kursoj



1) Okazas du kursoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul sed la nombro de gelernantoj mltmultiĝis: (a) La unuan kurson gvidas Nicholas Sarmiento kaj instruas nuntempe al nur 1 instruisto. (b) La duan kurson gvidas Murat Özdizdar, kaj nuntempe instruas al 3 gelernantoj kaj 2 instruistoj. Ambaŭ kursoj daŭros dum la tuta lerneja jaro.

2) La pagata kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto en ÖBD Sciencfikcia Biblioteko (vidu Turka Stelo #21 p.22) en kiu estis 11 lernantoj nun estas haltigita.

3) Nova kurso por Esperanto interesiĝantoj komencis en Çırac Atölye en Cağaloğlu distrikto en la Eŭropa parto de Istanbul kaj nun estas 8 lernantoj en ĝi. La kurson gvidas Vasil Kadifeli.

4) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

Tago de la Gepatra Lingvo



21-a de februaro 2018
Internacia Tago
de la Gepatra Lingvo

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako (Orienta Banglujo), ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala (bangla / bn / বাংলা ভাষা), kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo "pli granda", parolata de la fortuloj de tiu momento.

Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ne nur en Azio, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj, kiel en pluraj en pluraj eŭropaj landoj.....

Legu pli en Esperanto kaj en aliaj lingvoj ĉe:
<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2018/>

(Afiŝo ĉe la lasta paĝo)

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Karaj geamikoj,

Bogio el Pollando, kiu partoprenas en la Internacia Esperanto-

Sumoo, aperis sur la fronta paĝo de la revuo de Pola Esperanto-Asocio (Pola Esperantisto) kun diplomo de Sumoo. Ĉefredaktoro de Pola Esperantisto sur kovrilpaĝo eksponas esperantistojn, kiuj disvastigas Esperanton, kaj elektis ŝin kiel tian homon, kiu disvastigas E-Sumoon en Pollando kaj eksterlande.

Bonvolu disvastigi la informon al viaj amikoj.

Se vi ne scias, kio estas Sumoo, vizitu la subajn retejojn.

Nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Sumoo en Vikipedio: [https://](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)


eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Ĉefzorganto de la sumoo
HORI Jasuo



En la 14-a de januaro komenciĝis la jubilea 50-a Internacia Esperanto-Sumoo kaj ĝi daŭris ĝis la 28-a de januaro dum 15 tagoj. Dum la preparado de ĉi tiu numero la rezultoj ankoraŭ ne estis anoncitaj.

UEA



N-ro 721 (2018-01-19)

Alvoko al partopreno en la Esperantologia Konferenco,

Lisbono 2018

La organizantoj de la Esperantologia Konferenco 2018 okazonta en Lisbono, Portugalio, kadre de la 103a Universala Kongreso de Esperanto alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al [...]

N-ro 720 (2018-01-12)

La 103-a UK havas altan protektanton kaj altan nombron de aliĝoj

La Alta Protektanto de la 103-a UK estas s-ro Luís Filipe de Castro Mendes, Ministro pri Kulturo en la registaro de Portugalio. Konata poeto kaj verkisto [...]

N-ro 719 (2017-12-13)

Diru vian opinion pri la Malferma Tago

Universala Esperanto-Asocio ŝatus koni la opiniojn de la ĉeestaj kaj virtualaj partoprenintoj de la Malferma Tago en la Centra Oficejo kaj de la Seminario pri Informado, kiuj [...]

N-ro 718 (2017-11-16)

Belartaj Konkursoj de UEA en 2018

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, unu el la plej gravaj kaj jam klasikaj manifestiĝoj de la E-kulturo, invitas verkemulojn al partopreno en ilia 68-a okazigo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono. [...]

TEJO



19 Januaro 2018

Afiŝkonkurso de UNITED por ilia kampanjo de

2018 "Restu unuiĝintaj"

UNITED organizas denove afiŝkonkurson, ĉi-foje por sia tutjara kampanjo por kiu la temo estas simple la slogano de UNITED: "Restu unuiĝintaj". UNITED skribas: "Ni vivas en malfacilaj tempoj: faŝismo kaj dekstra ekstremismo ne nur disvastiĝas, sed iĝas pli kaj pli akceptitaj. Ni volas batali kontraŭ tiu bildo: nun estas la tempo por stari kune kaj [...]"

18 Januaro 2018

Trejnado pri Volontula Lingvoinstruado dum la Junulara E-Semajno

Kadre de la Erasmus+ projekto pri Volontula Lingvoinstruado, okazis dum la Junulara E-Semajno en Pollando 3-taga intensa trejnado kiu kovris bazajn temojn. La trejnadon partoprenis pli ol 15 homoj el 8 engaĝitaj organizoj kaj estis gvidata de du longtempaj kaj spertaj instruistoj, Jana Kamenická kaj Szilva Szabolcs. [...]

16 Januaro 2018

Nova numero de Revuo Kontakto: Eŭropo kaj Afriko – Ligitaj per eksterordinaraj paŝoj

La nova numero de Revuo Kontakto ĵus aperis en la reto! La ĉeftemo de la numero estas la historia unua Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Afriko. La abonantoj povas elŝuti la elektronikan version de la revuo. La redaktoro de Kontakto Rogener Pavinski enkonduke skribas: "Antaŭ viaj okuloj troviĝas iom eksterordinara Kontakto. Temas pri eldono, kies [...]"

Indas dediĉi energion al informado direktita al lingvistoj, ĉar ili estas la kutimaj fakuloj, al kiuj turniĝas ĵurnalistoj, kiam ili volas verki pri Esperanto. Krome ilin demandas politikistoj, kiam ĉi tiujn oni alparolas pri Esperanto. Tion opinias Renato Corsetti, kiu jam en la 1970-aj jaroj ekokupiĝis pri tia informado en Italio.

Ankaŭ lingvistoj estas homoj. Kaj kiel homoj ili estas influataj tre profunde de la ĉirkaŭa medio kaj de la ideoj de sia tempo. Tio okazas ankaŭ en Italujo. Kiam ekaperis Esperanto, italaj lingvistoj estis sub la forta influo de la germanaj novgramatikistoj kaj ĉiokaze de la idealisma lingvistiko de la 19-a jarcento. Ili ne povis aprobi Esperanton kaj ne aprobis ĝin. Tiu pens-maniero eĉ havis sian negativan influon tra la artikoloj de Gramsci, politikisto kaj ĵurnalistoj, kiu skribis malfavore al Esperanto post studoj en la universitato de Torino, kiu funkciis ankoraŭ laŭ la romantikaj ideoj pri lingvoj.

Bonŝance aperis tute sendepende juna parolanto de Esperanto, Bruno Migliorini, kiu iĝis fama itala lingvisto, kvankam en la faŝisma epoko oni konsilis al li, laŭ verŝajna onidiro, ke li forgesu pri Esperanto, se li volas karieri. Fakte li malaperis el la komunumo.

En la komenco de la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento bolis debatoj pri ĉio en Italujo kaj ankaŭ pri Esperanto. Ĝenerale lingvistoj taksis ĝin malpozitive pro tradicio de malpozitiveco de unu jarcento. Tiam komenciĝis kontaktoj inter junaj italaj parolantoj de Esperanto kaj junaj lingvistoj, kiuj pretis aŭskulti ideologiajn pravigojn pri la kontraŭimperiisma valoro de la internacia lingvo. Pro subteno de ili tiam aperis mia libro, *Lingua e Politica* (lingvo kaj politiko), kiu havis kelkajn legantojn en la lingvista medio.

La kontaktoj daŭris dum jaroj. Intertempe en la itala panoramo aperis sukcesa lingvisto, Fabrizioo

Pennacchietti, kiu instruis semidajn lingvojn en pluraj universitatoj, kaj kies esperantisteco estis konata de liaj kolegoj. Pro debatoj pri la lingvo de la tiam kreota Eŭropo estis eble ligi kontaktojn kun alia lingvisto, Tullio De Mauro, lastatempe mortinta, kies influo en la progresema intelektularo estis granda. Li estis mallonge ankaŭ ministro pri instruado en maldekstra registaro. Per lia helpo oni aranĝis debatojn pri Esperanto por lingvistoj en la universitato de Romo. Kaj li ankaŭ verkis enkondukon al la reeldonita lernolibro pri Esperanto de Bruno Migliorini.

Tio igis aliajn lingvistojn iom repensi pri Esperanto: Se De Mauro favoras ĝin, prefere ni estu prudentaj.

Iam en la fino de la 80-aj jaroj mi iĝis membro de la itala asocio de lingvistoj, kies animo estis la sama De Mauro, kaj tiam mi ekhavis la adresaron de ĉiuj membroj. Temis pri ankoraŭ preskaŭ pure papera epoko antaŭ la disvastiĝo de la reto. Per la kunlaboro de aliaj parolantoj de Esperanto – mi volas memori nur pri Umberto Broccatelli – ni starigis adresaron de lingvistoj, kiuj komencis ricevi la itallingvajn numerojn de la itala revuo de Esperanto, en kiuj estis sciencaj pritraktoj pri Esperanto aŭ raportoj pri eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj. Tia agado de sendado de informoj en presita formo daŭris jarojn.

Laŭgrade la malfavoraj komentoj pri Esperanto fare de lingvistoj malmultiĝis. Restis, kompreneble, la malfavoraj komentoj de ĵurnalistoj, ĉiujfoje kiam oni menciis ĝin kunlige kun la estonta lingvo de Eŭropo.

Sed la vera fina bato al la malpozitiva pritrakto pri Esperanto en lingvistaj rondoj venis ne pro rekta merito de nia kampanjo sed pro la libro de Umberto Eco pri la serĉo de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo, kiu aperis en 1993. Ĉar la prestiĝo de



Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kore mi dankas al vi pro la alsendo de la belega revuo *Turka Stelo*! Gratulon pro via grava laboro! Feliĉan Novjaron!

Maria Nazaré Laroca, Brazilo



Denove mi miras pri la kvalito de via revuo. Kun elkoraj bondeziroj por la nova jaro

Mirejo Grosjean, Svislando



Troo estas troa! Mi volas diri, ke la lastaj du numeroj de *Turka Stelo*, kiuj alvenis, enhavas legomaterialon altkvalitan por la tuta jaro 2018-a. **Renato Corsetti**



Gratulon pro la nova numero de *Turka Stelo*! Ĉu vi povus sendi al mi la retan ligilon, por ke mi sendu ĝin al la forumo de Duolingo?

Anna Löwenstein



Mi skribas por danki kaj gratuli pro la januara *Turka Stelo*. Bonega legaĵo! Aparte plaĉis al mi inter la interesaj artikoloj la dialogo inter Luiza Carol kaj Mireille. Brila!

Paulo Sergio Viana

Umberto Eco estis ankoraŭ pli granda ol tiu de Tullio De Mauro, efektive la lingvistoj akiris ankoraŭ pli grandan prudenton pri Esperanto. Kiel mi diris en la titolo, ankaŭ lingvistoj estas homoj, kaj ili ne ŝatas kontraŭdiri homojn pli famajn, kaj volonte sekvas la fluron.

La agado de regula informado al lingvistoj daŭris ankoraŭ en la komenco de la nuna jarcento ĝis 2010 proksimume, kiam pro akcidento la adresaro ne plu funkciis kaj neniu pretis rekonstrui ĝin. Intertempe oni aranĝis kunvenojn de lingvistoj, unu ĝuste en 2010 celebre al la 100-a datreveno de Itala Esperanto-Federacio kunlabore kun la Akademio de la itala lingvo, Accademia della Crusca.

Nuntempe Esperanto estas memkomprenebla aĵo inter italaj lingvistoj. Oni instruas ĝin en la universitato de Torino (persona sukceso de Fabrizio Pennacchietti estis la starigo de la kurso, kiun nun instruas Federico Gobbo), kaj pluraj priesperantaj agadoj okazas en la universitato de Parma.

Ĉu tio signifas, ke Esperanto gajnis en Italujo? Tute ne. Simple ne aperas atakoj al ĝi fare de lingvistoj, sed jes aperas atakoj al ĝi fare de ĵurnalistoj kaj aliaj, kaj la nombro de lernantoj de Esperanto apenaŭ estas influata de lingvistoj. Jes estas multaj disertacioj pri Esperanto, kaj de tempo al tempo iuj studentoj lernas pro mencioj en la universitataj lernolibroj pri lingvistiko.

Ĉu indas sisteme informi lingvistojn ankaŭ en aliaj landoj? Ĉu tio vere influos tion, kion ili diros aŭ ne diros pri Esperanto? La itala sperto indikas, ke jes. Sed eble la maniero aranĝi la kampanjon nun estus tute alia pro la nova reta mondo.

Informado al lingvistoj gravas, ĉar ili estas la kutimaj fakuloj, al kiuj turniĝas ĵurnalistoj, kiam ili volas verki pri Esperanto. Krome ilin demandas politikistoj, kiam ĉi tiujn oni alparolas pri Esperanto. Do estas bone, se la plimulto de ĉiuj lingvistoj, kaj ne nur la specialistoj, jam estas informitaj pri la realo de Esperanto kaj Esperantujo.

Estas tre bele, ke nun en Italio la lingvistoj plejparte scias pri la realo de Esperanto – sed verŝajne necesos ankoraŭ informi multajn lingvistojn en aliaj landoj. Kiel ni povos aranĝi tiajn kampanjojn?

Necesos krome zorgi, ke la akirita informo-nivelo restu. Por tio bonas plu regule sendi al multaj lingvistoj aktualajn informojn pri Esperanto el iom scienca vidpunkto.

Renato Corsetti



Fonto: <http://www.liberafolio.org/2017/12/12/ankau-lingvistoj-estas-homoj/>

Trezoro Huang Yinbao: La Esperantisto de la Jaro 2017

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015) kaj Stefan MacGill (2016).

En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon.

Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 20 kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis siajn voĉojn:



Trezoro Huang Yinbao — 11 voĉoj

Hori Jasuo — 8 voĉoj

Richard Delamore (Evildea) — 5 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Trezoro Huang Yinbao, 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto kaj entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Centro Ora Ponto, kunfondinto de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke en 2017 li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de

Unesko-Kuriero, kunmetis por ĝi tradukteamon, kaj krome lanĉis la sendependan revuon Tra la Mondo.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2017 Trezoro Huang Yinbao, kiu estas la unua aziano, ricevinta ĉi tiun honoran titolon!


Halina Gorecka
Sekretario

Fonto: <http://sezonoj.ru/2017/12/trezoro-10/>

Pri la Esperanta Unesko-Kuriero

La 2-an de aŭgusto pasintan jaron aperis de kunlaboranto Paulo Sérgio Viana la artikolo “Trezoro liveras al ni trezoron”, en kiu li informis pri la Esperanta versio de Unesko-Kuriero. Hodiaŭ mi volas ĝisdatigi la informojn kaj aldoni aliajn.

Sed antaŭe mi eksplikas la titolon – por tiuj kiuj ne legis la artikolon: Paulo Sérgio konsideras (ĝustege) la Unesko-Kuriero-n kiel “trezoron”, kaj Trezoro estas la (Esperanta) nomo de la ĉina kunordiganto kaj redaktoro de la revuo.



Pri la revuo la Direktorino de Unesko, Irina Bokova, diris en la unua numero en Esperanto:

Ekde sia naskiĝo en 1948 Unesko-kuriero disvastigas tra la mondo la idealon de homaro kunveninta en sia diverseco, unuiĝinta ĉirkaŭ universalaj valoroj kaj la fundamentaj rajtoj, kun la riĉeco de siaj kulturoj, de

siaj konoj, de siaj faroj. La Kuriero estas ĉefa elemento de la identeco de la Unesko, kaj unu el la elstaraj instrumentoj de ĝia humanisma mandato.

La ses oficialaj lingvoj de UN – kaj Unesko – estas la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa. En ili la revuo estis publikigita ekde 1948 (kun interrompo inter 2012 kaj 2017), sed ekde 2010 ĝi aperas ankaŭ en la portugala. Kaj nun ankaŭ en Esperanto. Pasintan jaron aperis tri numeroj en la internacia lingvo. Ili estas elŝuteblaj senpage (ĉe www.uea.org/revuoj/unesco_kuriero).

Pri la ekesto de la Esperanta versio la E-Vikipedio (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Unesko-Kuriero>) informas:

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: « se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta

Herbert A. Welker el Brazilo

eldono de Unesko-Kuriero». Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe la esperantistaro.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitato Trezoro Huang Yinbao, direktoro de la Esperanto-Centro Ora Ponto en Ĉinio.

La tradukantoj de la Esperanta versio vivas en pluraj landoj, ĝis nun en 18. Plej multaj tradukantoj nuntempe loĝas en Brazilo (4), Ĉinio (3) kaj Italio (3). Ĝenerale ĉiu voluntulo tradukas po unu artikolon, kelkfoje du aŭ eĉ pli. Evidente la artikoloj havas diversajn longojn kaj estas pli aŭ malpli facile tradukeblaj (depende de la temoj). Plej ofte oni tradukas el la angla aŭ la franca, t.e. oni uzas la anglan aŭ la francan version por traduki en Esperanton. Kelkfoje unu artikolo estas tradukata de du (tre malofte de tri) voluntuloj, kaj eblas, ke unu el ili uzas la anglan version, la alia(j) la francan. En la tri unuaj numeroj de Unesko-Kuriero neniu artikolo estis tradukita el la araba, la portugala aŭ la rusa, nur unu el la hispana kaj nur du el la ĉina. Unu aŭ du rusoj tradukis ne el la rusa, sed el la angla, kaj kvar brazilanoj tradukis ne el la portugala, sed el la angla aŭ franca.

Krom la tradukantoj laboras ankaŭ provlegantoj. Sub ĉiu artikolo estas skribita la nomo de la tradukinto, kaj plurfoje ankaŭ tiu de la provleginto. Kelkfoje estas dirite ankaŭ, ke la traduko estis polurita de iu alia voluntulo. Pluraj provlegantoj kaj polurantoj ankaŭ faras tradukojn.

Mi trovis strange, ke neniu tradukis el la araba, portugala aŭ rusa, kaj mi demandis al Trezoro, la kunordiganto de la E-versio, kiel funkcias la distribuo de la tekstoj: Kiu tradukas kiujn artikolojn?



>>> 10

Vi ne kredu je viaj oreloj...
Vi ne kredu je viaj okuloj...

sendis Georgios Leventidis, el

Estis preskaŭ nokto kiam la frato (monaĥo) eliris eksteren de la monaĥejo, kie li promenus en la tritikkampoj apartenantaj al la monaĥejo. Li havis ruzajn suspektojn kontraŭe unu monaĥo. Tiel li kun tiuj ĉi dubaj pensoj promenus inter de la tritikoj. La tritikkampoj estis grandega, nur sur kelkaj arboj povus halti la okuloj inter tiuj ĉi tritikaj ondoj, kiuj prenis diversajn formojn laŭ la forteco de vento.

Strangaj sonoj alvenis per la vento al la oreloj de la monaĥo. En la komenco li tute ne donis signifon al ili sed post iom da tempo la sonoj revenis pli laŭte. Ili ne povas esti veraj li pensis sed antaŭ ol finiĝi sian penson aŭdiĝis nun eĉ pli laŭte la samaj ridoj. Surpize ili estis virinaj ridoj. Ili devus veni de tiu ĉi malproksima arbo sed inter la altaj tritikoj li ne povis vidi klare, tiel li decidis iri pli proksime ĉar li ne povis kredi je siaj oreloj.

Li jam estis preskaŭ 40 metrojn malproksime de la arbo, de kie li supozis la virinaj ridoj alvenis sed li nun nenion ridon povis aŭdi. Li rigardis kaj rigardis kaj li ne povis kredi je siaj okuloj. Estis du homaj figuroj sub la arbo. Li estis certa, ke unu estis tiu monaĥo pri kiu li havis suspektemajn pensojn kaj la alia figuro devus esti la virino kiu ridis antaŭen. Senmove li rigardis al la figuroj sed li ankaŭ estis embarasita. La hararo de la virino kaŝis la vizaĝon de la monaĥo kaj ŝajnis, ke ŝi estis kisanta lin longe.


Li ne povis toleri rigardi pli al ilin kaj li senbrue malproksimiĝis de la peka arbo. Li preskaŭ kurante revenis en la monaĥejon kaj eniris en sian ĉelon, tamen li ne povis trankviligi sin, li ne povis dormi kaj daŭre en lia penso reaperis la vido de la monaĥo kun la virino sub la arbo. Li ne povis preĝi ĉar li ne volis eniri al la preĝejo por ke li ne renkonti tiun malbonan monaĥon. La aliaj monaĥoj vokis lin sed li diris, ke li sentis iomete malsana kaj ke li volis iomete ripozi. Sed liaj malbonaj pensoj pri la alia monaĥo fariĝis eĉ pli

viglaĵoj kaj pli profundaj. Li nur atendis la vesperiĝon por ke li reiru al tiu ĉi peka arbo. Ĉiuj liaj pensoj estis pri tiu arbo. Li ŝvitis kaj malfacile spiris ĉar liaj pensoj estis pasantaj kiel tranĉiloj tra sia cerbo. Li tremis. Li devis nepre malkovri la sekreton de tiu ĉi monaĥo. Li ne devus plu trompi la monaĥejon.

Vesperiĝis. Estis preskaŭ nokto, kiam li eliris el la monaĥejo kaj li paŝis al la direkto de la tritikkampoj kiu apartenis al la monaĥejo.

Li nun ne plu havis ruzajn suspektojn kontraŭ tiu monaĥo sed li serĉus por kulpatestojn. Li jam estis en la sama loko kie li estis heiraŭ nokte, sed li nun iris pli proksime. Li denove aŭdis la saman virinan ridon kaj vidis la samajn du figurojn, unu kontraŭ la alia kun la virina hararo fluganta tien kaj reen pro la vento. La monaĥo venis pli proksime al ili sed li ne povis vidi tre bone pro ke jam estis nokto. Do, li decidis surprizi ilin. Tiel li kuris al ilin kaj kiam li estis apud ili, li piedabatis la pekulon kaj samtempe kriis: SILENTU PLU, ĝis kiam vi daŭrigos tion. Tiam li subite kun miro rimarkis, ke la du homaj figuroj estis nur garboj de tritiko kuŝantaj unu sur la alia, kaj la vento trapasanta inter la tritikkampoj kaj inter la branĉoj de la arbo kune kun la sono de la fluanta akvo en la apuda rivereto kreis strangajn sonojn kiuj similis al virinaj ridoj.

Tiu ĉi monaĥo kun embaraso poste konsilis al la aliaj monaĥoj, ke eĉ se ili tuŝas la aferon kun siaj propraj manoj ili ne tuj kuraĝu kulpigi aliulon.



tradukis

Georgios Leventidis

el la libreto "La Pasio de Kritiko" de la monaĥo Gregorio de Sankta Ĉelo de Monaĥejo de Kutlumusiu, Sankta Johano de Teologo en Sankta Mono.

Kia la rilato inter fantazio kaj realo? ĉu ili kunekzistas? ĉu la unu forpuŝas la alian? kio okazas? Unu ideo estas, ke la fantazio antaŭiras kaj la realo sekvas; alia ideo estas, ke fantazio naskiĝas el la realo. Ambaŭ ideoj ŝajnas al mi ĝustaj, ĉar mi ŝatas la fabelojn, sed ankaŭ la rakontojn pri eventoj mirindaj. Tamen ĉio tio ĉi puŝas min ekster mian ĉefan temon; mi nun pensas pri la arto kaj pli precize pri la belarto. Ŝajnas ke arto, belarto kaj homo iras kune.



Kiam la prahelenoj, la unuaj homoj kiuj aperis sur la parto de la tersurfaco, kiun ili nomis Helenujo, trovis riĉan, fruktodonan teron, abundajn ĉasaĵojn, fiŝoplenajn akvojn, ili trovis ĉion kion la homoj bezonas kaj deziras. Tamen, tiuj Helenoj trovis ne nur tion, sed ankaŭ multon alian, ili trovis muzikon, poezion, dancon, lirikon, alivorte ili trovis la Muzojn (Μούσαι), kiuj ĉiam estis, ili trovis diojn kiuj inspiris kaj instigis ilin ĝuadi la vivon, sed ĉiam pensante pri io nova, ĉiam kreante ion kroman. Tiele naskiĝis la filozofio, la arto, la scienco, la literaturo, multo alia, tamen ĉio tio ĉi sufiĉas, ek, nun, al nia rakontado:

En Ateno (Αθήνα), la plej antikva kaj glora helena urbo, estis naskita Dedalo (Δαίδαλος). Tiu viro estis la plej admirinda skulptisto, teknikisto, arkitekto, inventisto de la mondo. Li estis de la naturo kaj la dioj dotita per ĉia talento kaj kapablo, tiel ke li povis fari, realigi ĉion, kion povas kapti la homa menso.

Unue, Dedalo iĝis konata kiel admirinda skulptisto. Ĝis liaj tagoj la statuoj prezentantaj homojn aŭ bestojn ne havis okulojn kaj ties kruoj kaj brakoj estis kunligitaj kun la korpo. Dedalo estas la unua, kiu faris tiajn statuojn en tute normalaj pozoj, kun brakoj fleksitaj, etenditaj, tenataj malproksime de la korpo, kun la piedoj malfermitaj, en pozo de movo, kaj ankaŭ kun okuloj vive elokventaj. Alivorte, la statuoj de Dedalo tute similis al vivantaj estaĵoj, tiel, ke estis

multaj, kiuj kredis ke oni devis ilin ligi, por ke ili ne foriru.

Dedalo lerte ellaboris ĉiun materialon, li majstre skulptis la ŝtonon, lignon, kupron, marmoron, ĉion ajn. Krome, li konstruis multon alian kaj aldone li inventadis diversajn utilajn aĵojn, kiel estis la hakilo, la borilo, la fiŝgluo kaj aliaj.

Tamen, tiu, tiom genia homo, havis sian tiklan punkton, li estis enviema, li ne toleris la antagonismon. Tiel, kiam juna lia nevo kaj lia lernanto montriĝis tre kapabla kaj inventema, kaj komencis elpensi ilojn kaj aparatojn, kiel estis la cirkelo, la ceramista turnplato, la segilo k.a., Dedalo estis tiom ĝenita, ke en ordinara disputo, li tiom incitiĝis ke li ekpuŝis forte la junulon, kiu, falinte de alta loko surteren, mortis.

Estis murdo, pro kiu Dedalo estis, tre indolge, kondamnita al dumviva ekzilo.

Li foriris de sia patrujo, li iris al Egiptujo, kie li estis akceptita de Faraono, la reĝo de la lando, kun grandaj honoroj.

En Egiptujo Dedalo desegnis kaj konstruis admirindajn palacojn, eĉ la majestan kaj grandiozan propileon de Menefro (Μέμφις) kaj multajn ankoraŭ belegajn monumentojn. Post nelonge, li estis adorata kiel dio, tiel ke la Egiptoj dediĉis al li grandan templon.

Malgraŭ ĉio tio ĉi, Dedalo deziris reveni en helena lando, do li foriris de Egiptujo kaj iris al Kreto (Κρήτη), kie la tre riĉa kaj potenca reĝo Minoo (Μίνωας) akceptis lin majeste kaj oferis al li sian amikecon kaj protekton. La tute plena reĝa kaso donis al Dedalo la eblon montri ankoraŭfoje sian unikan, superhoman genion kaj majstrecon. Li kreis grandiozajn konstruaĵojn, palacojn plenajn je belegaj ornamoj, statuoj, temploj. Li konstruis la reĝajn banejojn kaj dancejojn, precipe li desegnis kaj konstruis la mondfaman Labirinton (Λαβύρινθος), similan al tiu kiun li estis konstruinta en Egiptujo. Tiu Labirinto estis stranga konstruaĵo el sennombraj diverslarĝaj koridoroj, kiuj interplektiĝis per sinsekvaj kurboj kaj kondukis al seneliraj keloj aŭ al novaj interplektitaj vojoj, el kiuj oni ne povis eliri. La konstruaĵo estis uzata kiel prizono por la malamikoj de la reĝo.

Kiel sciante, Minoo estis unu el la tri filoj de Zeŭso (Ζεύς) kaj Eŭropa (Ευρώπη). Por iĝi reĝo de Kreto li bezonis la helpon de la dioj, do, li elektis Pozidonon (Ποσειδών), la dion de la maro, kaj, en la ĉeesto de multaj popoloj, li preĝis al li kaj petis ke li sendu al li nedubeblan signon, per kiu iĝus klare ke la dioj preferas lin kiel reĝon de Kreto. Tuje, el la maro elsaltis kaj kuris apud Minoo, granda, eksterordinare



bela, tute blanka taŭro, kaj kompreneble tio ĉi sufiĉis, Minoo iĝis reĝo.

Li bone sciis ke por montri sian dankemon, li devis sanktoferi al Pozidono, la belegan beston, tamen, la taŭro plaĉis tiom multe al li, ke li preferis ĝin teni kaj sanktoferi al la dio alian, ordinaran taŭron.

Kompreneble la granda dio ne povus toleri tian ofendon. Ĉiuj sciis ke la dia kolero estas tre danĝera, ke la dia puno estas senindulga. Pozidono sin turnis al Pasifaa (Πασιφάη), la saĝa kaj fidela edzino de Minoo, al kies menson li metis nenormalan, senbridan voluptan pasion por la taŭro. La malfeliĉa virino tute ne konsciante tion kio okazis al ŝi, multe suferis pro sia arda deziro kuniĝi kun la disendita besto. Ne eltenante la suferadon ŝi petis la helpon de la ĉiopova Dedalo, kiu, sciante ke la dia volo nepre efektiviĝus, faris per lignoj skeleton de bovino, kiun li tegis per vera bovina felo kaj li estigis perfektan, kvazaŭ vivantan bovinon, en kiu eniĝis Pasifaa, tiele, ke la blanka taŭro kuniĝis kun ŝi fervore.



Nur kiam la abomeninda seksumo estis farita la reĝino rekonsciiĝis, tamen ŝi memoris nenion. Minoo, ne povante elteni tian familian tragedion, turnis sian senbridan koleron al Dedalo, kiu la lastan momenton evitis la areston kaj sin kaŝadis, esperante ke li povos

eskapi el Kreto. La danĝero iĝis por li multe pli granda, kiam Pasifaa naskis la frukton de la anormala kuniĝo, monstren, kiu havis korpon de viro kaj kapon de taŭro. Tio estis la mondkonata Minotaŭro (Μινώταυρος), kiu pli poste iĝis la sola loĝanto kaj gardisto de la Labirinto.

Fideluloj de la reĝo tre atente kontroladis kaj priserĉadis ĉiun akvoveturilon kiu foriris de Kreto, por trovi Dedalon. Kiam tiu lasta komprenis ke li ne povos foriri per ŝipo, sciis ke li devis uzi sian neelĉerpeblan inĝeniecon. Fakte, per vakso, plumoj kaj lanugo faris du paroĵn da grandaj flugiloj, kiuj per rimenoj estis bone alĝustigitaj al la dorso kaj la brakoj de la portanto.


Kiam ĉio estis preta, Dedalo kaj lia juna filo Ikaro (Ικαρος) surportis la flugilojn kaj forflugis kiel grandaj agloj. Ili estis la unuaj mortemuloj kiu flugis kaj la impresoj estis unika, nepriskribebla. La du viroj, flugante super la lazura Egea Maro (Αιγαίον Πέλαγος)

ĝuadis la senton de la absoluta libereco. Ikaro, kun junula entuziasmo, dezirante sperti la plej ekstreman ĝuadon, malgraŭ la krioj de Dedalo, flugis pli kaj pli alten, celante atingi la sunon. Ĉu junula naiveco? Ĉu ordinara homa impertinenteco? kiu scias? La fakto estas ke oni ne povas rigardi pli foren ol li devas. Tiel la varmo de la sunradioj fandis la vaksajn flugilojn kaj Ikaro falis, perdiĝis en la maro. Eble dia puno pro nepardonebla aroganteco, mi ne povas diri ion kun certeco, la vero tamen estas, ke Ikaro gajnis la eternecon, ĉar la parto de la Egea Maro kie li falis ricevis lian nomon, ĝi estas nomata Ikara Maro (Ικάριον Πέλαγος), same kiel la plej proksima belega insulo, kiu ricevis la nomon Ikario (Ικαρία).

Dedalo, daŭriginte sian flugiradon atingis Sicilion (Σικελία), kie li estis akceptita kun grandaj honoroj de la reĝo Kokalo (Κώκαλος), kiu metis lin sub sia protektado.

Tie li daŭrigis sian mirindan laboradon, li konstruis sanktejojn, palacojn, banejojn, stadionojn, monumentojn, grandan artefaritan lagon, akropolon kun nekonkerebla murego kaj multon alian.

Post kelka tempo, la nove divastigita famo de Dedalo atingis Minoon, kiu, kun militfloto iris al Sicilio. Tie, minacante lin je milito, postulis de Kokalo la liveron de Dedalo. Kokalo ŝajnis ke li konsentas, kaj oferante al la kreta reĝo gastadon, invitis lin en sia palaco. Tie, kiam Minoo iris al la banejo, servistoj de Kokalo lin mortigis. Kokalo liveris la kadavron de Minoo al la Kretanoj, dirinte ke la reĝo glitis en la banejo, falis kaj mortis. Sekvis sieĝado, milito kaj multo alia, tamen ĉio tio ĉi estas objekto de alia rakontado



Ni diru nur, ke tia estis la fino de Minoo. Pri la fino de Dedalo mi scias nenion, ĉar la mito nenion diras. Ŝajnas tamen al mi ke fino ne estas, ĉar Dedalo ne mortis, li vivas eterne en la menso de la geniaj, inventemaj, kreemaj homoj!

Fonto: "GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO"

verkis Spiros Sarafian, el Grekujo

LA VIRO KAJ LA HUNDO

Ĉu iam vi vidis plurajn hundojn pridisputantaj oston? Mi vidis viron, kiu havis nur ostojn, batali kontraŭ hundon.

La viro estis rifuĝinto kiel mi, kaj la hundo suferis malsaton kiel preskaŭ ĉiuj rifuĝintoj. Ankaŭ la hundoj serĉas rifuĝon kaj ankaŭ ni rifuĝintoj vivas hundan vivon.

En la diversaj aleoj fronte al la pavilonoj, staras grandaj ujoj, kien oni enĵetas la rubon. Unu el la kuiristoj, unu el la mahnultaj feliĉaj mortaloj ĉi-tieaj, ĵus malplenigis teleron en la rubujon.

Same kiel kadavroj altiras korvojn, kiel la putraĵoj vokas al si plurajn specojn de bestoj, la telero elirinta el la kuirejo, aŭ, se pli ĝuste diri, la restaĵoj el la telero enŝutitaj en la rubujon altiris du malsatajn bestojn: hundon kaj rifuĝinton.

La rubujo tre altis. La hundo metis sian paron da antaŭaj piedoj sur la bordon de la rubujo kaj flaradis ien tien en la interno. La viro venis kaj prenis la hundon, forte tirante ties postajn piedojn, por pridisputi al ĝi la kaptaĵon.

Sed la hundo faris salton kaj enfalis tuta en la rubujon. Tiam la viro, rezignacie, kliniĝis. Li kliniĝis antaŭ la hundo, li kliniĝis antaŭ la destino kaj li kliniĝis ankaŭ en la direkto al la fundo de la

2



rubujo!

La lupo de Gubbio ¹ estis nomata de sankta Francisko el Asizo "Frato lupo". La viro de Récébédou ² — la homo de Récébédou transiros al la historio samkiel la homo de Kromanĵono ³ — nur per la forto venis al armistico aŭ al paca kunvivado kun la frato hundo...

Jaume Grau Casas

El la libro "Tagoj kaj Ruino"

Tradukita de Miguel Fernández

¹ Lupo en la ĉirkaŭaĵo de la urbo Gubbio en Umbrio kiu suferigis la urbanojn ĝis kiam sankta Francisko el Asizo malsovaĝigis ĝin.

² Kampo de judaj rifuĝintoj en la sudo de Tuluzo en Francio dum la Dua Mond-Milito.

³ Loko en Akvitanio, kie estis eltrovita kolektiva sepulitejo de la malfrua paleolitiko. La homo de Kromanĵono = La saĝa homo.



6 >>> Jen kiel funkcias la sistemo:

Unesko dissendas unue la publikigotajn tekstojn en la angla kaj franca samtempe al ĉiuj redaktoroj de la aliaj versioj de la revuo (araba, ĉina, hispana, portugala, rusa kaj Esperanta). La redaktoro aŭ la vic-redaktoro sendas la tekstojn al ĉiuj Esperantaj tradukantoj, sed nur la anglaj kaj francaj tradukantoj povas komenci la tradukadon (de tekstoj kiujn ili elektas inter la publikigotaj). La alilingvaj tradukantoj devas principe atendi ĝis la apero de artikoloj en sia gepatra lingvo. Tamen, ĉar ne estas sufiĉe da tradukantoj kiuj estas denaskaj parolantoj de la angla aŭ franca, oni akceptas aliajn volontulojn – se ili bone regas la anglan aŭ francan.

En la numero de pasinta oktobro de la oficiala organo de UEA (la revuo Esperanto) oni atentigis pri la fakto, ke kvankam la portugala ne estas oficiala lingvo de UN kaj Unesko, ĝi estis akceptita de Unesko kiel lingvo de la Kuriero kaj de la retejo. Do evidente la apero de Esperanta versio de Unesko-Kuriero estas granda paŝo antaŭen. "Esperanto apogata de Unesko havas grandan esperon."

verkis **Herbet A. Welker**, el Brazilo

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/?m=1>

D DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

Luiza verkis eseon, rando de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas. La komenco de ĉi tiu rakonto aperis en IPR 2016 2 kun komentoj de Mireille Grosjean kaj reagoj de la aŭtorino en dialoga formo.

**Dua parto**

Luiza: KIEL ONI HELPIS MIN MEMLERNI ESPERANTON. Mi ofte demandas min: kio estus okazinta, se la unua persono, kiun mi kontaktis, estus iu balbutanta eterna

komencanto aŭ iu malafabla malhelpema ulo? Kio estus okazinta se, okaze de mia unua kontakto kun la esperantista komunumo, mi estus renkontinta kverelemajn personojn, insultantajn unuj la aliajn per fuŝa Esperanto aŭ eble krokodilante la tutan tempon? Ĉu mia novnaskita intereso pri Esperanto ne malaperintus? Ĉu?? Ĉar miaj unuaj paŝoj en Esperanto-lando okazis en nekutime taŭgaj kondiĉoj, eble netipaj (?!), mi konsideras min nun aparte bonŝanca pri tio. Ĝuste tial mi volas kundividi en tiu ĉi ĉapitro miajn personajn spertojn kiel komencanta lernantino, ĉar ili eble povus interesi propagandistojn kaj instruistojn pri Esperanto.

Dum la unuaj semajnoj, mi lernis laŭ la kurso "Bildoj kaj demandoj" de Hokan LUNDBERG, troviĝanta en la paĝaro de "lernu!". Tiu kurso ŝajnis al mi bonega, kvazaŭ perfekte tajlorita por miaj gusto kaj bezono. Post du semajnoj, mi kontaktis telefone la unuan esperantiston, kies adreson mi trovis en la reto: tiu estis Jehoshua TILLEMAN, mia preskaŭ najbaro, kiu ekde tiu tago fariĝis mia amiko. Mi tiam ankoraŭ ne sciis, kiom bonŝanca mi estas: mi hazarde kontaktis unu el la ege raraj homoj, kiuj ja scipovas Esperanton je la plej alta nivelo (dum 10 jaroj mi renkontis neniun, kiu scipovas la lingvon pli bone ol li!) kaj posedas ankaŭ pedagogiajn kvalitojn, krom sia ĉiama preteco helpi komencantajn lernantojn kaj ne nur tiujn.


Baldaŭ mi partoprenis esperantistajn lokajn renkontiĝojn. Ankaŭ ĉiflanke mi estis nekutime bonŝanca: dum miaj unuaj 8 jaroj de Esperanta vivo, la loka Esperanta grupeto, al kiu mi apartenas, renkontiĝis ĉiumonate en la hejmo de Martha OTTO,

la prezidanto de la Bahaa Esperanto-Ligo, kiu portempe loĝis en nia lando (dum ŝi volontulis por la Bahaa Centro). La malgrandeco de la grupeto donis al ni ĉiuj la ŝancon partopreni diskutojn kaj ekamikiĝi. La gastigantino ne scipovas la lokan lingvon, do ni nature devis eviti krokodili. Ĉar la gastigantino estas afabla kaj ĉarma persono, ŝi sukcesis krei vere varman etoson. Ŝi ankaŭ invitis tre ofte alilandajn esperantistajn turistojn, precipe pilgrimantojn vizitantajn la Bahaan Centron.

Mia unua kontakto kun la Esperanta komunumo okazis do en ŝia hejmo kaj lasis tre fortan impreson en mia koro. Mi rememoras, ke tiutage ni estis ĉirkaŭ 12 personoj en la saloneto de Martha. La ĉeestantoj apartenis al 4 religioj, minimume 4 etnoj, kaj la aĝoj variis inter ĉ. 20 kaj ĉ. 70. Krom mi, ĉeestis ankoraŭ 2 komencantoj, kiuj konatiĝis por la unua fojo kun la grupo, samkiel mi. La aliaj konis unuj la aliajn jam delonge. Estis la fino de majo kaj la apartamento de Martha estis superŝutita de freŝaj floroj. La fruktoj kaj kukoj alportitaj de gastoj bonodoris. Dum ni manĝis ilin, ni laŭvice diris po kelkajn vortojn pri nia familio, nia profesio, niaj ŝatokupoj, niaj interesoj...

Dum la unuaj jaroj, ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj (precipe Jehoshua) faris por mi ĝuste tion, kion Dennis KEEFE saĝe rekomendas kiel la plej taŭgan metodon por plenkreskuloj: ili helpis min memlerni. Iom post iom, ankaŭ mi ekprovis helpi aliulojn memlerni. Kompreneble, memlernado de lingvo neniam finiĝas.

Indas menciigi ĉi tie la grandan rolon de interreto koncerne mian esperantistiĝon. Ekde la unuaj paŝoj en Esperanto-lando, mi estis interŝanĝanta retmesaĝojn kun la kunlernantoj de "lernu!", poste ankaŭ kun la anoj de TEVA, kun la legantoj de la revuo "Esperantista Vegetarano"... Miaj kontaktoj pere de interreto kaj skajpo plimultiĝis rapidege. Per interreto, mi aŭskultis kiel eble plej ofte la radioelsendojn de Ĉina Radio Internacia, por kutimigi miajn orelojn ankaŭ al azia akĉento. Lastatempe, mi ekkonis geamikojn ankaŭ pere de Esperanta RetRadio, kiun mi ofte aŭskultas kaj tutkore amas. Nun, ĉ. 90% el ĉiuj miaj esperantistaj geamikoj estas interretaj aŭ/kaj skajpaj geamikoj.



Mirejo: Kara Luiza! El via teksto mi prenas kaj reliefigas diversajn ideojn.

Unue vi mencias la kontakton, vian unuan kontakton, kun altnivela parolanto. Tio estas tre pozitiva fakto. Plie tre gravas, ke li estis

akceptema al vi, bonvenigis vin en la komunumo, ne korektis vin montrante superecan senton. Tio estas leciono por ni esperantistoj. Kelkaj el ni forgesas, ke iam ili estis komencantoj kaj pene kaj malrapide konstruis frazon tradukante ĝi n en la menso el la gepatra lingvo. Ni ĉiuj devas esti paciencaj kaj toleremaj, kaj korekti amike kaj kuraĝigante.

Due mi volas mencii, ke certa distanco inter la lernanto kaj la majstro bezonatas. Tamen ĝi ne devas esti enorma. Se akademiano babilas kun komencanto, eble la afero fariĝos teda por ambaŭ. Ne nepre. Certa distanco devas esti, por ke la majstro povu korekti la erarojn kaj klarigi la frazojn laŭ la demandoj kaj bezonoj de la lernanto. Tamen doktoriĝo ne nepras por tio.

Trie vi mencias, kiom interesaj estis la rekontiĝoj ĉe esperantistino, kunvenoj internaciaj kaj plurkulturaj, sen krokodilado. Jen bona maniero stimuli la motivadon de la lernantoj. Spertante la internacian etoson, ili ekuzas la lingvon en vera situacio kaj konfirmiĝas ĉe ili la konvinko, ke Esperanto estas utila por tiuj, kiuj ŝatas tiajn kontaktojn. Ni provu krei tiajn okazojn por niaj lernantoj. Baldaŭ venos la momento aliĝi al niaj juliaj kaj aŭgustaj kongresoj; ni pensu pri

tio.

Kvare vi emfazas memlernadon, kaj la konsilojn, kiujn vi ricevis por atingi tion. Jes ja, la instruistoj ne devas nur klarigi gramatikon, sed konsili la lernantojn en ilia organiza prilerna agado.

Kvine vi mencias la uzon de la Reto. Estas fakto, ke ni havas nuntempe tiun mirindan ilon, kiu ebligas al ni esti en kontakto kun diversaj mondopartoj. Aŭskulti retradiojn, babili per skajpo, jen bonaj metodoj por aŭskulti la lingvon kaj ekuzi ĝin. En aprilo 2016 en centra Turkio, Kapadokio, okaze de la Mez-orienta Kongreso, mi aŭdis turkan junulon, kiu bonege parolis kaj rakontis sian manieron lerni nian lingvon. Li aŭskultis ĝin konstante. Nur tion li faris. Tio signifas, ke tage kaj nokte senĉese li fluigis Esperanton en siajn orelojn. Kaj la lingvo invadis lian cerbon kaj enĉambriĝis tie iom post iom. Li ne iris al kurso, li ne malfermis lernolibron. Li sorbis la lingvon el kanzonoj, prelegoj, raportoj, diversaj elsendoj de diversaj radioj kaj televidprogramoj. Fakte iom kiel bebo eksponataj al lingvo. La rezulto estis bonega!

Fonto: **ILEI - IPR Revuo 2016-4**

(daŭrigota)

Inteligenta patrino

sendis **Ginette MARTIN**, el Francujo

Mi aĝis eble kvar jarojn, kaj mia fratino tri. Mia patrino devis lavi la plankon de la kuirejo, sed kiel fari kun tiuj petolaj knabinoj, kiuj saltis apud ŝi kaj lasis spurojn de piedoj, ĝuste sur la lokojn, kiujn ŝi jam purigis !

Venis al ŝi bona ideo.

En nia kuirejo kuŝis kontraŭ la muro granda ligna kofro kun tre impresa dimensio por infanoj, mi supozas 50 cm alta, kaj relative longa. Antaŭ la milito, oni konsilis al homoj prepari tiujn kofrojn kun "nestoj" por kaseroloj. Oni plenigis la kofron per malnovaj ĵurnaloj, pecigitaj ĉifonoj, lignaj seĝaĵoj, kaj



la kaseroloj estis metitaj tien por fini la kuiradon sen kuir-forno. Oni tiel ŝparis brulaĵojn.

Mi memoras, ke tiu kofro estis sufiĉe giganta por ni knabinoj. Kaj kion faris nia patrino por lavi trankvile la plankon? Ŝi metis du adoltajn seĝojn sur la kofron kaj la knabinojn sur la seĝojn. Tiel ni ne plu povis moviĝi sen riski fali. La piedoj de la seĝoj apudis kvazaŭ abismon, tre altan por ni. Gravis tute ne moviĝi.

Ĉu vi kredas, ke ni sentis nin punataj ? Tute ne, subite la rigardo al la kuirejo estis tute ŝanĝita, ni dominis la mondon; sur niaj tronoj, ni estis reĝinoj, kaj ni rigardis nian sklavinon labori.

En la nunaj tempoj, oni kulpigus mian patrino, ke ŝi transformis nin al cirkaj akrobatoj, riskante nian vivon, sed mia patrino elektis ne krei, kaj samtempe solvi la problemojn de la ĝenantaj seĝoj kaj de la ĝenantaj infanoj.

Kial ŝi ne metis nin en alian ĉambron dum tiu laboro? Eble tiutage ni rifuzis iri, eble ŝi preferis havi nin sub siaj okuloj, ĉar ni estis vere petolaj infanoj !

Mi dankas al ŝi, ke mi vivis tiun plaĉan momenton.

verkis kaj sendis **Ginette MARTIN**, el Francujo



Ömer Asım Aksoy (1898-1993) estis tre grava leksikologo en la Turka Lingvo Socio, la ĉefa organo de la postrespublika lingvoreformado. Li naskiĝis en urbo Gaziantep (sudorienta Turkujo). Li haltis siajn medicinajn studojn por partopreni la batalon de sendependeco en 1920. Li laboris kiel oficisto, instruisto kaj juristo. Li estis ankaŭ politikisto, elektita deputito de la Respublika Popola Partio en 1935. Li aktivis en la tutnacia kultura organizo "Popolaj Domoj". Post la fonda de la Lingva Socio, li postenis en ĝia administra komitato. Ekde 1941 ĝis 1976 li prezidis ĝian branĉon pri vortkolektado. Post la venko de la Demokrata Partio en 1950, li perdis sian pozicion en la nacia asembleo, kaj dediĉis sin entute al lingvaj aferoj. Li estris la publikigon de multaj vortaroj dum sia laborado en la Lingva Socio.



Türk Dili

Muhtaç olduğumuz kelimeler

— Türkçe, bütün düşünce inceliklerini anlatabilecek kadar zengin değildir. Bundan dolayı muhtaç olduğumuz kelimeleri yabancı dillerden almak zorundayız.

Türkçenin özleştirilmesi ve yabancı dillerin baskısından kurtarılması davasını tutmayanlar böyle söylerler.

Dilimizin birçok kelimeye muhtaç olduğu doğrudur. Ancak bu ihtiyaç yalnız Türkçede değil, bütün dillerde her gün kendini göstermektedir. Çünkü yeni buluşlar ve yeni kavramlar, bütün dillere sürekli olarak yeni kelimelerin eklenmesini gerektirmektedir. Peki, bu diller ne yapıyorlar? Tatalım ki muhtaç oldukları kelimeleri başka dillerden alırlar. Ya o dillere bu kelimeler nereden geliyor? Gökten mi iniyor? Kelimeleri insanlar yaparlar. Zengin dediğimiz dillerin kelimelerini o dili konuşanlar, ihtiyaç duydukça yapmışlar, böyle böyle dillerini geliştirmişlerdir. Türkçeyi zenginleştirmenin ve kendine yeter hale getirmenin yolu da budur. Bu yolu tutmayıp «yabancı dillerden kelime almak zorundayız» dersek, tembelliği teşvik etmiş ve kelime türetmeye elverişli dilimizin gelişmesini kösteklemiş oluruz. Muhtaç olduğumuz kelimeleri yüzyıllar boyunca kendi dilimizden yapmayıp yabancı dillerden aldığımız içindir ki Türkçe zenginleşmemiş, kısır kalmıştır.

Ömer Asım Aksoy

subtenon por la lingvoreformo kaj en sia korespondado, kaj en sia kolekto de ĵurnal-artikoloj pri la temo. Jen la traduko de artikoleto verkita de Ömer Asım Aksoy pri la lingvoreformo, tranĉita kaj konservita en la paperaro de Hayrettin Dural.

tradukis kaj sendis, **Başak Aray**, el Turkujo



Vortoj, kiujn ni bezonas:

“La turka lingvo ne estas sufiĉe riĉa por esprimi ĉiujn nuancojn de penso. Tial ni devas prunti niajn bezonatajn vortojn el fremdaj lingvoj.”

Tiel diras iuj, kiuj ne subtenas la kaŭzon de la purigado de la turka lingvo kaj ĝian savon el la subpremo de aliaj lingvoj.

....

Estas vere, ke nia lingvo bezonas multajn novajn vortojn. Sed tiu bezono ĉeestas ĉiutage ne nur en la turka, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj. Ĉar novaj malkovroj kaj novaj konceptoj devigas al ĉiuj lingvoj la aldonon de novaj vortoj daŭre. Nu, kion faru tiuj lingvoj? Ni supozu, ke ili pruntas siajn bezonatajn vortojn el aliaj lingvoj. Kaj el kie alvenas tiuj vortoj al tiuj lingvoj? Ĉu ili malsupreniras el la ĉielo? Vortojn faras homoj. Vortojn en lingvoj, kiujn ni taksas riĉaj, faris tiuj, kiuj parolas tiujn lingvojn, kiam ili bezonis tion, do ili tiel progresigis kaj kreskigis siajn lingvojn. Tio ja estas la vojo por riĉigi la turkan kaj igi ĝin memsufiĉa. Ne sekvante tiun vojon kaj dirante “ni bezonas prunti vortojn el aliaj lingvoj”, ni kuraĝigas al pigreco kaj malhelpas la progreson de nia lingvo, kiu jam posedas la eblecon pri vortfarado. Dum jarcentoj ni ne kreis niajn bezonatajn vortojn el nia propra lingvo kaj pruntis ilin el fremdaj lingvoj, tial la turka lingvo ne riĉiĝis, kaj fariĝis malfekunda.

Ömer Asım Aksoy
el revuo Türk Dili (Turka Lingvo)

Ni vivas en la tempoj, kiam tio kio iam okazis nature, hodiaŭ estas parte aŭ entute artefarita. Nuntempe ni pli ofte aŭdas kaj legas, ke la kreado kaj amasa produktado de artefaritaĵoj troviĝas preskaŭ sur la pinto de atingiĝoj. Se estus tiel, ni povus kompreni, ke ankaŭ la homo mem tiel ŝanĝiĝis, ke tiu nun naskiĝas grandparte artefarita. Tamen la problemoj, kiuj nun tuŝas nin ĉiam pli ofte, kaj tuŝas eĉ infanojn, atestas, ke io en nia vivo ne tro bone funkcias. Pripensu, kion mi pli frue kuraĝis aserti, legante ĉi suban preskribon de iu maljuna pola kuracisto, kaj estu certa, ke li elprovis ĉion je nekalkulita nombro da kazoj plensukcese. Jen liaj konsiloj.



Dr Jerzy Jaśkowski

Kiam vi sentos vin „disrompita”, vi havos febremon, temperaturaltigon, ŝvitojn, kapdolorojn kaj similajn simptomojn, tiam tuj prenu 10 tablojdojn da lignokarbo, tiu nigra, sed ne en kapsuletoj. Normala tablojdo entenas 500 mg dum la kapsuleto da lignokarbo nur 150 miligramojn kaj kosta je 300% pli. Se vi ne posedas ĉe vi tiun karbon el apoteko, tiam povas esti ordinara lignokarbo el kameno. Oni devas nur ĝin bone disrompi per martelo je pulvoro. Ne permesu vin „azenigi” per vendejaj produktoj – kutime malaltozaj kaj altprezaj!

Plenkreskulo devus preni ĉ. 2 cm da tia karba pulvoro en glaso da akvo. Al infanoj ni donu 0,5-1 centimetron, depende de ties pezo. Post 5 horoj ripetu la procedon, post la sekvaj 5 horoj denove. Faru simile ĉiun 5-an horon ĝis la fekaĵo fariĝos nigra kaj plej bone ripetu tion ankoraŭfoje. Kelkfoje, post la preno de tro malgranda kvanto da karbo la malsano revenas.

Post ĉio, t.e. post ĉ. 24-30 horoj oni devus eltrinki kiel eble rapide 1 glason (aŭ 2) da acida bovina lakto,

nepre la natura. Neniu kaze trinku tiun blankan likvaĵon en plastaj aŭ paperaj skatoloj. Post laŭvicaj 5 horoj eltrinku denove trinkpoteton da acida lakto.

Samtempe, oni devus priŝpruci la malantaŭan parton de la gorĝo, tiun kun la velo (postpalato), per la solvaĵo el memfarita pomacido. La preparo mem de tia likvaĵo estas unufoja afero, ĉar vi faras unu botelon, kiu sufiĉas por duonjaro.

Temas pri la maniero elprovita kaj medicine motivita!

La viruso de la gripo penetras ĝuste la malantaŭan parton de la gorĝo. Priŝpruci vian gorĝon vi devas ĉiun horon, ĉar glutante salivon vi forigas la acidon.

La karbo estas nur absorbilo, kiu rolas kiel „polvosuĉilo de toksinoj” troviĝantaj en nia digesta sistemo. Ĝi kaŭzas neniujn kromefikojn. La simptomoj, kiujn ni sentas dum la malsano, estas kaŭzitaj de toksinoj, kiuj kreiĝas dum la „batalo” de nia imunsistemo kun la viruso, kaj ne pro la penetrado de la viruso al niaj ĉeloj - kiel oni opiniis iam.

Se ni komencos la kuracadon sufiĉe frue, neniuj toksinoj penetros la sangocirkulan sistemon kaj la komencaj simptomoj malaperos rapide – dum 24 horoj. Okazos neniuj kromefikoj, kiam vi eventuale prenos la karbon senbezone.

Laŭvice la acidan lakton vi devus eltrinki por rekolonii vian nutraĵsistemon per bonaj, necesaj bakterioj. Memoru, ke la plej bonaj kaj plej malmultekostaj troviĝas en la natura, nepreparita industrie, bovina lakto. La falsa lakto neniam acidiĝos.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis **Andreo Bach** el Gdynia en Pollando

Vi povas aŭskulti la son artikolon en la jena ligilo:

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2017/12/kaze-de-la-gripo-kaj-virusinflamoj.html?view=flipcard>



Hodiaŭ mi prezentos al vi Elian-J. Finbert, ĉu vi konas lin ?

Elian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS :

jen ĝi en la katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org/?inf=9437>

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957.

Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj.

Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj.....

CIKONIO (rakonto n° 36 p. 63-67)



Mia amikeco al tiu legenda birdo kun flugiloj el neĝo borderitaj per nokto elvenas de mia infanaĝo, infanaĝo parte pasigita en Nilo-valo, kie ĝi travintras. Ne pro la granda mistero de ties malsupreniĝo de l'ĉiel' kun pendanta al beko, la beboj, ke ĝi alportas sur teron, aŭ kiel skribis Andersen,

ĉar « Peter festas Kristnaskon en Egipto », kaj ke ĝi parolas Egipte ĉar estas la lingvo, kiun ĝia patrino lernis al ĝi », dum ne estas egipta lingvo. Sed ĉar okazis iam, dum mi troviĝis sur teraso de nia domo, kien mia pasio pri kajtoj ĉiam allogis min, ke majesta cikonioflugaro pasis super mi, kun streĉitaj koloj, ŝvebaj flugiloj. Kaj jen unu inter la birdoj, subite disiĝas el la bando, implektiĝas, se tiel diri konvenas, en siaj plumoj, turniĝadas en la ĉiel' kaj, blanka kaj nigra maso, falegas kaj alteriĝas ĉe miaj piedoj. Mi

estis kompreneble timigata, sed samtempe ekzaltata de tiu aera vidaĵo, kaj de la cikonio, kiu klopodas remeti sin surpiede, kaj finfine sukcesas. Mi tiam forlasis mian kajton, kaj rapidrapide iris serĉi savhelpon.



Mi jam iom konis tiun birdon, estinte ĝin sekvinta malantaŭ la sobra plugilo aux eĉ pli simpla plugpioĉo de la fellah-o en kampoj, ekkaptanta jen koleopteron, jen larvon, bufon, muson, aŭ marĉborde ranojn.

Mi do kunportis hakitan viandon, kaj ĝin donacis al mia bela birdo, kiu okulumis al mi per sia nigra tiom inteligenta okulo, kvazaŭ pludeseĝnita de du strekoj el kohl, sed kiu nur post multe da tempo konsentis proksimiĝi. Videble ĝi certe estis vundita, tamen vidis mi neniom da sangospuro. Nia ĝardenisto, spertulo, alveninte, sciigis min, ke cikonioj, pro tiomlonga restado en malsekaj terenoj kaj tiomofta tretado en malprofundaj marĉoj, finfine maljuniĝantaj iĝadas reŭmatismaj, tiel, kiel la homoj. Mi neniam povis kontroli la verecon de tiu diagnozo, sed tiam ĝi sufiĉis al mi, kaj mi decidis, kunligiĝi al tiu birdo, flegi ĝin, kaj resanigi ĝin.

Ĝi fariĝis la konstanta gasto de l'teraso, kie ĝi senmoviĝadis longajn horojn sur unu piedo, kun pripensa kaj solena mieno, aŭ ĝin primarŝadis, ĵetante siajn kruojn antaŭen per larĝaj egalaj paŝoj, dum pririgardanta la ĉielon kun la kolo arĉita. Ekde ĝi ekvidis min, ĝi venadis al mi, kaj mi tristiĝis kaj humiliĝis pro ne kompreni la sekan kaj ripetitan bruon de ĝiaj bekklakadoj, kiuj konjekteble esprimis la intimajn pensojn de ĝia tristiĝinta koro. Por plaĉi al ĝi mi rezignis flugigi mian roz-kaj-verd-koloran kajton, ĉar tiu ludilo ĝinsimila timigis ĝin.

Mi ofte iris vizite al ĝi, kaj mi estis certa, ke ĝi atendis pri mi ĉiujn tagojn, eĉ pli, je ĉiaj horoj de l'tago. Ĝi plej facile rekonis miajn paŝojn, kiam mi supreniris la ŝtuparon po du ŝtupoj kune, ĉar mi trovis ĝin tie posteniĝante ĉe la pordo alterasa, kun ĝiaj intensrigardaj okuloj, lertaj kaj sagacaj, ĝia svelta flugmaŝina korpo kaj ĝiaj nigrelakitaj flugiloj brilaj kaj bonorde refaldigitaj. Mi pensas, ke longajn momentojn ni pasigis kune apude, kaj iam dormiĝinte, meze la ega varmo, sterniĝanta sur la kahelŝtonoj, mi vekigis kun apud mi, flugilojn ŝirme malfalditajn, la cikonio atenta kaj patrineca, rigardadanta al mi kun vartemo, vartemo, kiun mi divenis pro ĝia zorgema mieno.

Mi iradis en kampojn serĉi al ĝi lokustojn kaj ĉe la lagetoj kapti ranojn por ĝi. Kiam mi malĉeestis tro longtempe, ĝi ne malsciis, ke tio estis ĉar mi estis

serĉanta ĝian nutron, kaj mi trovis ĝin malsupre de la ŝtuparo, kiun ĝi estis lerninta malsuprenpaŝi kaj suprengrimpi per skuaj paŝoj, kaj eĉ antaŭ ol mi ĝisvenintis sur l'terason, ĝi jam serĉfosadis en mia flanksako per sia longa, akra kaj malmola beko, kiu ekglutis la bestetojn avide.

Okazis tion, kio estis okazenda, sed antaŭvidi ĝin estis for de mia penso.

En mia infanmenso, la cikonio estis por ĉiam ligita al nia domo, kiel feliĉportanta amuleto. Ĝi estis mia amiko tiel, kiel mi estis ĝia amiko. Iun matenon mi trovis la terason malplena. Mi tuj komprenis, ke estinte refortiĝinta, kaj ĝiaj reŭmatismoj for, ĝi estis ekfluginta al ĉiel'.

Tio estis al mi tiel, kiel perfido, kaj ankaŭ estis en mia vivo mia unua aflikto. Vane mi rigardegis al l'lazura ĉielo, kie krozis milvoj, kie turniĝadis la kolomboj. En la kampoj, surborde de Nilo, ĉe la laĝetoj mi restadis longe, kaj gvatis la cikoniojn, sed nenie mi trovis mian, kiun mi estus rekoninta inter mil.

Mi reekludis la kajton, ĝin mi flugigis alten kaj foren, pensante eble la birdo ĝin rekonos, kaj revenos, kiel al alkuniĝsigno.

Kaj poste la temposablo fluis, fluadis. Sed la teras' tamen plu restis mia havenloko, mia plejŝata tereno, kie jam soleco estis mia mistera aliancino, des pli ke, kaŝe kaj obtuze mi atendis, ke la cikonio revenos.

Kaj jen fakte ĝis revenis en la posta septembro, tempo kiam la fruktkvastoj de niaj daktilarboj en ĝardeno komencis maturigi siajn sukcenkolorajn fruktojn.

En la ŝtupar' mi aŭdis sistrajn ruladojn, kiujn mi tuj rekonis. Mi impetis. Jen estis ĝi. Ĝi ne estis forgesinta min, ĝi plu aspektis kia ekstempe solena maljuna malvulgara sinjorino, kaj ĝi ekgrakadis milde tirante la kolon malantaŭen kaj antaŭen, dum malfaldigante siajn ravajn ĉefplumojn. Parolis ĝi al mi, flustris min, se tiel diri konvenas, pri aferoj de nur ĝi kompreneblaj. Kaj jen kiam mi atingis la terason, mi blindumiĝis pro miro : ĝi estis superŝutita per cikonioj, kiuj min ekvidinte leviĝis fluge malalten, kaj poste remetiĝis

ĉien, silentaj, flugilojn ekpretajn, timantaj kaj samtempe fidaj, ĉiuj ope salutantaj per turniĝoj de l'longaj koloj, laŭmaniere de koranaj deklamistoj.

Mi, la infano, estis vivanta legendon, legendon iĝintan realaĵon. Fabelmondo eksturmintis mian vivon. Estis tia, kia inicia sakramento.

Mi sciis, ke tamen tio ne povis daŭri, ke tiu unika momento estis dia favoro. Ekestis en la aro de nigraj kaj blankaj plumoj ordonvorto, kiu flugis de bird'al birdo. Kaj subite tumulto flugila kaj makzela ekaŭdiĝis. Mi estis surdigita. Mi vidis sinlevi la altaj purpurgantitaj kruroj, kiuj surfaldiĝis dummomente sub la vosto tiel, kiel la suriĝ-ekipaĵo de aviadiloj, poste fariĝis pendantaj, kaj jen la amaso alten flugimpetis, vojiris cirklojn, ŝvebis, malkovrinte la sorigantaj aerfluojn, kaj malaperis el vido en la egipta diamante malmola helego.

Kompreneble, mia cikonio sekvis la aron, sed dum tempeto, pli forpasema ol fulmo, en mia kredema fidema animo, mi kredis, ke ĝi revenintis por neniam plu min forlasi. Kaj plus la una ĉagreno, kiu min alvenis el ĝi, aldoniĝis dua pli dolora. Dume, fakto, ke la preterpasanta birdo memorintis min kaj nian hejmon, kie mi estis ĝin akceptinta, nutrita, fleginta, por kies zorgo mi estis oferinta mian sveltan kajton, igis min ĝin respektigi.

Tri sinsekvajn jarojn ĝi revenis kunportante min mesaĝon de sia amikeco, ĉiufoje en la tempo, kiam turtoj vokadis supre de l'daktiluloj niaĝardenaj, meze la ruĝaj grapoj da mielecaj fruktoj.

Poste ankaŭ mi obeis migradojn de mia destino, je iroj kaj returnoj misteraj tra la mondo. Sed mia penso plu konservas stampon de la pasado de l'stilzobirdo en mia infanvivo, tiu infano, kiun mi neniam ĉesis esti, iom flugila, iom grunda, portante en mi la hieroglifan signifon de cikonio, kies senco estas « kompatato ».

sendis **Rolland Platteau**, el Francio

LA EŬROPA LINGVO

Eŭropa integra procezo pli kaj pli perfektigaĵas ĉiujare, do ni pli proksimiĝas al aŭtentika unuiĝo kaj konsolido de tuta Eŭropo je unu korpoparto de diversaj nacioj. Tamen estas unu kondiĉo.

Ni havas komunan himnon, flagon kaj valuton. La problemo estas nur akcepto de komuna lingvo por Eŭropo, pri kiu oni kontinuas persistajn diskutojn. Sen ebligado al ĉiuj homoj de Eŭropo facilan interkompreniĝon helpe de facila kaj neŭtrala lingvo,

esperantigis Edward Jaśkiewicz, el Pollando

la eŭropaj nacioj daŭre restos por si reciproke fremdaj kaj neniam ĝisfine integriĝos.

Kiel aktuale aspektas la aferoj? Nuntempe en Eŭropa Parlamento laŭ principoj de ŝajna egaleco estas parolataj preskaŭ 40 lingvoj, ĉar krom membroŝtataj naciaj lingvoj estas allasitaj ankaŭ lingvoj de iuj minoritataj nacioj. Malgraŭ tiu egaleco ekzistas la lingvoj pli „egalaj”, kiel la: franca, germana,



hispana kaj itala. Kaj „plej egala” el ili estas la angla.

Pri ŝajna „egaleco” de ĉiuj eŭropaj lingvoj plej bone atestas la fakto, ke kiam oni kontraktas konvencion ekzemple en pola kaj angla lingvoj, do tiam estos deviga nur la angla teksto kaj la pola formas kiel ornamo.

Tiun eksterordinare komplikitan (pro tradukadoj kaj kostoj) la lingvan problemon oni penas ielmaniere solvi. Februare de la 2004. en EP oni aranĝis voĉdonadon por elekti komunan lingvon por Eŭropo. Por voĉdono oni proponis iujn naciajn lingvojn, kiuj ricevis nepercepteblan kvanton da voĉoj. Nur por lingvo Esperanto voĉdonis la plej multo, ĉar eĉ 43% da deputitoj.

Pri popularigo de E-lingvo atestas ankaŭ aranĝitaj interretaj sondadoj (www.freewels.com/international-languages), kie voĉdonis eĉ 70% da respondintoj.

Ĉi rezultoj elvokis panikon en tre forta anglalingva, influprema politika grupo. Por malgravigi tiujn favorajn por Esperanto voĉojn, Leonard Orban la komisaro de UE pri aferoj de la multlingveco – trudas utopian koncepton pri ŝajnaj ĉarmoj kaj valoroj de la multlingveco.

Por kredindigi ĉi koncepton, li iniciatis specialan komisionon, kiun konsistigis reprezentantoj de: “British Council”, “Instituto de Goethe” kaj “Centro de Popularigo de franca lingvo kaj kulturo”, do la institucioj escepte neobjektivaj, interesiĝintaj nur pri popularigo de siaj propraj naciaj lingvoj. Tiu neobjektiva komisiono prezentis kelkajn nerealajn konkludojn: ĉiuj eŭropanoj, por interkomunikiĝadi devus dum sia tuta vivo lerni fremdajn lingvojn kaj trakti tion kiel sportan distron

Tamen la plej esenca postulo de tiu komisiono estas penado por prezenti verkiston Józef Konrad Korzeniowski (Josef Conrad), kiel la imitindan modelon – ja gepatra lingvo por li estis la pola, sed vojaĝante tra la mondo, li sin priservis kiel tiaman dominantan la francan kaj verkis belan literaturon en la angla, ĉar li traktis ĉi lingvon kvazaŭ propran. Do ĉiuj eŭropanoj devus akcepti anglan lingvon kiel la PROPRAN.

Tia konkludo esprimplene iras renkonte al hegemoniaj aspiroj de Britio, kiu per dominado de sia lingvo ekde jardekoj certigas al si politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn influojn, do preskaŭ kolonie dependigas Eŭropon.

Pri la sama dominado konkuras kun Britio – kvankam ne tro efike – Germanio kaj Francio, eĉ Hispanio kaj Italio. La pola eksministro pri kulturo Zdzisław Podkański preferus, ke Pollando strebu al grupo de privilegiaj landoj. En forumo de eŭropa debato de civitanoj li proponis, ke la pola lingvo

reprezentu slavajn landojn kaj restu enkalkulita kiel la sesa en vico de dominantaj en Eŭropo. Por teni tiun dominadon oni disvastigas

miton pri ŝajna universaleco de la angla lingvo. Ĝi estas ja mensogo, ĉar en Eŭropo anglalingve parolas nur malmultnombra grupo da homoj, kiuj finregis tiun ĉi lingvon en nesufiĉa grado. Vasteco de la angla lingvo en la mondo malpligrandiĝas, ĉar pli multo de ekskoloniaj landoj revivigas siajn naciajn lingvojn.

La elstara lingvisto Claude Piron, kiu estis parolanta multajn lingvojn, la ektradukisto ĉe UN, frakase opiniis pri la angla lingvo kiel homonimeca, tre malfacila en prononcado kaj skribado. Li konsideras, ke eĉ multjara lernado ne garantias bonan majstradon per la angla lingvo. Tiam lukson povas permesi al si nur malmultaj.

Kian problemon kaŭzas dominado de angla lingvo en la mondo, plej bone atestas ekzempla incidento kia eventis en septembro de la 2007. sur aerodromo en Vancouver, kie la polo Robert Dziekański iĝis murdita de policanoj nur pro tio, ke ne konis la anglan kaj ne scipovis kun ili inperkompreniĝi.

En la forumo de UE-komisaro pri multlingvecaj aferoj Leonard Orban (<http://forums.rc.eŭropa.eŭ/multilingualism.languages-for-yo...>) en la temo “Graveco de fremdaj lingvoj”, voĉdonis jam pli ol 825 personoj el tuta Eŭropo kaj plimulte da voĉoj estis por Esperanto.

La ideo de Esperanto, kiel de la plej facila lingvo kaj enkonduko ĝin lernejojn ankoraŭ pli multe dominas en aliaj internaciaj TTtejoj de tiu debato. Precipe en tiaj landoj kiel Germanio, Francio aŭ Britio. Eĉ la angloj, kiuj ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn, ĝuste – ho mirindaĵo – tre volonte lernas ĝin.

Se ni plu indiferece rigardos la provojn de trudado de la angla dominantanta lingvo por Eŭropo kaj eĉ sen antaŭzorga saĝo senkritike apogos tion, do en baldaŭa estonteco ni povos dividi la sorton de indianaj popoloj, kiuj nuntempe regas nur la anglan, hispanan kaj portugalan, sed siajn proprajn lingvojn ili jam ne konas.

Esperantigis: **Edward Jaśkiewicz**, el Pollando
Fonto: La artikolo aperinta en pola semajna revuo “FiM” (Faktoj kaj Mitoj) nr 4. 2010 prilaborita de Kazimierz Krzyżak



Observi homojn estas mia hobbio. Pro tio mi ŝatas veturi en trajnoj, precipe en fermitaj 6-personaj kupeoj, kunvojaĝante kun fremdaj homoj en tia proksimeco, kian oni aliloke evitus. Ĝuste en tian kupeon mi iris ĉi vespere. Vidante nur tri homojn en ĝi, mi malfermis ĝian pordon kaj ekparolis: "Bonan vesperon. Ĉu ĉi tie ankoraŭ estas libera loko?" La tri pasaĝeroj - dugemaljunuloj kaj unu knabino - kapjesis, kaj la maljuna virino -gestis al mi per mansigno, ke mi libere elektu iun ajn el la tri liberaj lokoj. Mi metis mian dorsosakon sur la pakajkradon kaj eksidis. Dume la trajno jam ekveturis. "Enuiga vojaĝo", mi pensas post kelkaj minutoj, "ili ĉiuj silentas, apenaŭ moviĝas, apenaŭ spiras..."

Mia observemo tamen ne ripozas. Sen tro rimarkeble turni mian kapon al ili, mi rigardas la du oldulojn. "Verŝajne ili estas geedzoj", mi pensas. Sed, sobre pensante, mi konstatas, ke nenio en ilia konduto indikas tion. Ili ne interparolas, ili eĉ ne vere rigardas unu la alian. Kvazaŭ du fremduloj.

Mia rigardo transiras al la knabino. Ĉirkaŭ 20-jara mi taksas ŝin, kaj supozas, ke ankaŭ ŝi estas studento, kiu ĵus pasigis la semajnfinojn hejme ĉe siaj gepatroj. Ŝi aspektas kiel dormanta infaneto. Kiel anĝelo. Silentaj homoj kun kontenta vizaĝo estas dolĉaj. Iom malgranda ŝi estas, kun unuavide ne tro okulfrapa eksteraĵo. Sed ŝiaj trajtoj elradias mildecon kiun substrekas la pala bruno de ŝia hararo same kiel la sabla koloro de ŝia bluzo. Nek ŝminkon nek ornamaĵojn mi rimarkas. Natura ĉarmo.

Dum mi meditas pri ŝi, la maljunulino ofertas sandviĉon al la viro. Senvorte. Li akceptas ĝin ankaŭ senvorte. Tutcerte ili estas geedzoj, malnovaj geedzoj. Iam mi legis, ke averaĝaj malnovaj geedzoj interparolas nur sep minutojn tage. Ĝuste tiaj ili estas. Sendube.

La knabino interesas min pli. Ĉu malantaŭ ŝia trankvila fasado troviĝas indiferento aŭ kaŝita pasio? Certe ŝi estis tre obeema infano. La gepatroj ŝin bone edukis. Ĉu ŝi simple neniam estis ribelema, aŭ ĉu ili sufokis ŝian volon per psika, eble eĉ fizika perforto, tiel ke interne turmentas ŝin subpremitaj sentoj kaj emocioj? Ne, ŝi aspektas sufiĉe feliĉe...

"Ĉu vi enpakis la gazeton?" La voĉo de la viro rompas la silenton. Ŝajnas, ke la maĉado de la sandviĉo vekis lin el lia letargio. Finmanĝinte, li nun volas ion legi.

"Ne, kial?", respondas la edzino.

"Mi diris al vi, ke vi enpaku la gazeton."

"Tion mi ne aŭdis."

"Mi nun volas legi la gazeton."

"Mi pensis, ke vi faris tion jam hejme. Krome, ni ja baldaŭ alvenos."

"Tio min ĉagrenas, ke vi ne enpakis la gazeton."

Tedaj homoj. La mondo estas plena je ravaĵoj kaj mirakloj, sed tiuj du uloj havas nenion pli agrablan por diri.

Fakte, ravaĵoj interesas min pli. Kaj konsciiĝante pri tio, mi denove rigardas al la knabino. Al mia anĝelo. Ŝi certe nur malfrue ekinteresiĝis pri knaboj. Mi eĉ povus imagi, ke ŝi ankoraŭ neniam havis amanton. Eble la amo de panjo kaj paĉjo ankoraŭ sufiĉas por ŝi.

"Tio min vere ĉagrenas, ke vi ne enpakis la gazeton", subite ripetas la viro. Kaj la rigardoj de mia anĝelo kaj mi renkontiĝas. Ŝiaj pupiloj montras unue al mi, poste kaŝe al niaj du kunvojaĝantoj, kaj fine denove al mi. Ni ridetas unu al la alia. Ni pensas same. Mi ŝategas ŝin, ĉar mi ŝategas homojn kiuj regas la lingvon de la okuloj. Malmultaj, tro malmultaj ĝin parolas.

Tiel ankaŭ la du olduloj nenion rimarkis. Ankoraŭ dek minutojn ni vojaĝis kvarope. Tiam okazis io, kion mi ege deziris kaj samtempe ege timis: La du olduloj eliris ĉe la sekva stacio, kaj neniu nova venis en nian kupeon. La trajno denove ekmoviĝis. Streĉita malcerteco ŝvebas en la aero. Neniam antaŭe mi tiom forte sentis la intimecon de trajnkupeo. Mi apenaŭ aŭdacas ĵeti rigardon al ŝi. Ja observante homojn, oni ĉiam atentu, ke la alia ne sentu sin tro observata. Aliflanke, ĉu virinoj povas distingi rigardojn, kiuj admiras anĝelojn, de tiuj, kiuj nur deziras konkeri objekton? Ŝi verŝajne jes. Do mi ne tro timu. Kaj dum nia veturo tra la malhelo nia kupeo ja ofertas nenion alian vidindan.

Ŝajne ankaŭ ŝi tion komprenis. Subite niaj rigardoj denove renkontiĝas, kaj ĉi-foje ŝia rideto penetras profunde ĝis mia koro. Io varma kaj milda trafluas kaj plenigas min, ĝi faligas min en edenon etoson. Ho, kiom mi amas tiun ĉi senton, ho, kiom mi dankas al mia patrino, ke iam, kiam mi estis ankoraŭ bebo, ŝi jen kaj jen ridetis al sia infano el plena koro, tiel forprenante de ĝi ĉiujn timojn kaj zorgojn kaj lulante ĝin reen al praa feliĉo, kvazaŭ reen en sian sinon. Unue subkonscie, poste racie, mi sciis, ke tiaj momentoj ĉiam revenos en mia vivo, eĉ se nur malofte, kaj tial mi neniam serioze pensis pri memmortigo. La vivo tro belas, ĝi donas tro da ŝancoj por profunda feliĉo. Precipe, se mi ne perdos ŝin, mian anĝelon. Kaj tiucele mi devas ekparoli kun ŝi, eĉ se tio rompas nian silentan, sensonan serenecon.

"Ĉu ankaŭ vi studas en Heidelberg?", mi





demandas ŝin.

"Jes, ĉe la pedagogia altlernejo.", ŝi respondas. Unuafoje mi aŭdas ŝian voĉon, kun plezuro notante, ke ŝi sonas ĝuste tiel varme kaj milde kiel mi imagis ĝin.

"Kaj do vi verŝajne loĝas en unu el la apudaj studentaj hejmoj, ĉu ne?", mi daŭrigas, jam sentante min ĝoja kaj fiera pro tio, ke mi sukcesis komenci konversacion kun ŝi.

"Ne, mi loĝas en Eppenheim, ne tiom proksime al la altlernejo."

"Ĉu vi nun veturos per tramo tien?", mi aŭtomate pludemandas, jam fantaziante pri tio, ke mi akompanos ŝin dum la veturo, malgraŭ tio, ke Eppenheim ne vere estas mia direkto kaj ke krome antaŭ la stacidomo atendas min mia biciklo.

"Hm", ŝi respondas, kaj ŝajnas al mi, ke tio signifas "Jes, kompreneble".

Ni silentas. "Ŝi vere estas trankvila homo", mi pensas, kiam mi konsciiĝas pri tio, ke ŝi nur respondis al miaj demandoj, sed ne reciprokis ilin. "Sed ĝuste tiaj silentemaj homoj povas havi tre profundan animon." Dum mi pripensas, ĉu mi nun demandu ŝin pri detaloj de ŝia studado aŭ ĉu mi simple rakontu ion pri mi mem, ŝi subite leviĝas kaj surmetas sian

dorsosakon. "Mi devas foriri nun ... ĝis!" Ŝiaj vortoj ŝokas min. Elirante el la kupeo, ŝi donacas al mi lastan rideton, dum ŝiaj okuloj diras: "Mi kompatas vin."

"Mi ne komprenas", respondas la miaj. Ja restas ankoraŭ almenaŭ dek minutoj ĝis Heidelberg. Ŝi tute ne aspektis, kvazaŭ ŝi apartenas al tiuj homoj, kiuj nervoziĝas jam kvaronan horon antaŭ la halto de la trajno pro la timo maltrafi sian stacion. Kaj verŝajne ŝi eĉ ne devas rapidi al la tramhaltejo, ja la tramoj ankaŭ vespere veturas ankoraŭ ĉiun dudekan minuton.

Jam ŝi estas for. Ĉu mi tuj sekvu ŝin? Tio aspektus altrudiĝeme. Ankoraŭ postrestas la feliĉo en mi, sed la racio min avertas. Se mi ne reagis nun, mi morgaŭ iros tra la pedagogia altlernejo kaj la tuta urbeto Eppenheim, ĉie elrigardante pri knabino, kies nomon mi eĉ ne konas. Aŭ mi provos trovi ŝin pere de anoncgazeto aŭ la loka radio, kiel lastatempe faras multaj gejunuloj en similaj situacioj. Pli bonas reagi nun. Tiu vibrado, kiun mi sentas en mi, fakte estas tiom forta, ke sendube temas pri amo. Ŝi tiom mankas al mi, ke necesas sekvi ŝin. Mi imagas, kiel mi demandas ŝin pri ŝia adreso ĉe la trajnpordo, sur la kajo, ĉe la tramhaltejo aŭ en la tramo; mi vidas nin iri man-en-mane al ŝia domo...

Elirante el la kupeo, mi finfine vidas ŝin ĉe la trajnpordo, sed intertempe jam pluraj homoj staras inter ni. Malfacilus preterpasi ilin. Fine la trajno haltas. Elirinte, mi serĉas ŝin sur la kajo. Subite kvazaŭ fulmo io min trapikas kaj disŝiras: Jen iu barbulo ŝin brakumas kaj arde kisas.

verkis **Ulrich Matthias**, el Germanio

Fonto: <http://www.u-matthias.de/verko/okuloj.htm>

Ŝercoj



- Panjo, mi deziras naĝi en la maro!
- Mi ne permesas tion filo mia, ĉar en la maro estas multaj ŝarkoj.
- Sed ankaŭ paĉjo naĝas en ĝi.
- Jes, sed li havas vivasekuron.

Edzino diras al sia edzo sur la marbordo:

- Imagu karulo, preskaŭ mi dronis en la maro. Junulo savis min.
- Mi scias, antaŭ nelonge li venis ĉi tien por pardonpeti.

- Paĉjo, mi decidis, forlasi hejmon kaj elekti propran vivon. Mi deziras amuziĝi, konatiĝi kun knabinoj kaj ekkoni la mondon.
- Filo mia, atendu min! Ankaŭ mi iras kun vi.



Krucvortenigmo



Horizontale

1. Mekanika aparato, por antaŭenĵeti aviadilon for de la ferdeko de ŝipo aŭ velglisilon for de la grundo; Sufikso montranta kolektivecon kaj uzata por derivi el numeraloj aŭ kvantaj vortoj adv-ojn aŭ adj-ojn signifantajn «ĉiuj kune», «en grupoj de».
2. Granda duoninsulo, troviĝanta inter la Ruĝa Maro, la Hinda Oceano kaj la Persa Golfo; Mallongigo de ribonuklea acido.
3. Ag' de iu, kiu ne kontraŭstari al io, kion oni ne aprobas aŭ kio malplaĉas, ĝenas aŭ suferigas, kvankam oni kapablas malhelpi ĝin, kaj rezulto de tiu ag'; Supozo celanta klarigi ion, sed restanta en la sfero de la spekulativa penso.
4. Radiko C_5H_{11} - ; Senvokala verbo esprimanta la ekziston.
5. La 21a grafemo de la E-a alfabeto; La formo de la kurbo, kiu montras la momentajn valorojn de alterna kvanto ĉe ĉiu momento dum ciklo.
6. Parto de la korpo, adaptiĝinta al speciala vivofunkcio.
7. La kapabl' de pli-malpli energie uzi la mensajn fortojn, per kiuj efektiviĝas la agoj; La ĉefa arteri', komenciĝanta ĉe la maldekstra ventriklo de la koro; (inverse) metal', rigardata kiel tre multevalora kaj tial uzata en juvelarto, monfabrikado ks.
8. Emblem' de ludkartoj; Malamika interpuŝiĝ' de du homgrupoj aŭ armeoj.
9. Geokronologia unu', ampleksanta plurajn periodojn, responda al la kronostratigrafia unuo eratemo; Teksaĵo el linaj, kanabaj, jutaj, kotonaj fadenoj, interkrucitaj laŭ aparta sistemo; Membro de grupo, de societo.
10. Honortitol' de hebreaĵ, poste de judaj leĝistoj; Kolekto de objektoj de nia percepto aŭ pensado, konsiderata kiel finita tuto;

Vertikale

1. Muka elfluo, kaŭzita de inflamo de la koncerna mukozo; Emblem' de ludkartoj, signita per ruĝa koro.
2. Delikata, agrabla kaj subtilaodoro de kelkaj plantoj aŭ aliaj substancoj; Prezanta devion al la interna flanko.
3. Pli malvasta part' de la homa korpo, inter la subo de la brusto kaj la koksoj; (inverse) Nobel' ranganta malpli alte ol vicgrafo.
4. Insekto el la ordo de himenopteroj, kiu produktas mielon kaj vakson; (inverse) Konjunkcio esprimanta diferencon por enkonduki la duan parton de neegaleca komparo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

5. La unua el la helenaj skeptikuloj (ĉ. 365—ĉ. 275); Senvokala mezurunuo de pezo, valoranta 1 000 kilogramojn.
6. Senkonsonanta individuo, kies ecoj ne estas menciitaj; Fabela besto, kiun antikvuloj imagis kun flugiloj, ungegoj kaj serpenta vosto.
7. Granda, longforma ujo el ligno aŭ ŝtono, en kiu oni donas al brutoj por manĝi aŭ trinki; (inverse) Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto.
8. Partikulo, signifanta «en alta grado»; Miksaĵo de likvo (ordinare oleo) kaj pigmento, uzata por ŝmiri surfacon kaj ĝin kolorigi.
9. Frakcio kun numeratoro egala al unu; Adjektiva sufikso prezentanta la plenumanton de procezo pli frue ol ties plenumiĝo.
10. Simbolo de elemento kun atomnumero 18, atommaso 39,95; La 21a grafemo de la E-a alfabeto; Pezo de ĉia entenantaĵo (kesto, sako, botelo ktp), en kiu estas enpakita ia varo aŭ kemiaĵo.
11. Sufikso montranta sistemon, kiu trudas al personoj sub ĝia influo difinitan konduton; senvosta vertebrulo el la klaso de amfibioj, ordo de anuroj, simila al bufo, sed kun longaj postaj kruroj, senveruka haŭto kaj kun dentoj.
12. Oficiala raporto, per kiu rajtigita aŭ kompetenta persono konstatas, kion li faris, vidis, aŭskultis.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)

Mono kaj Justeco

Foje la reĝo demandis al Afanti: "Afanti, se antaŭ vi estus mono kaj justeco, kiun el ili vi elektus?"

"Mi elektus monon," respondis Afanti.

"Kiel, Afanti!" miris la reĝo. "Se estus mi, mi certe volus justecon, absolute ne monon. La mono estas nenio valora, sed justeco estas malfacile trovebla."

"Oni volas tion, kio al li mankas, via moŝto," klarigis Afanti.

Morti du tagojn pli frue ol vi

Pri Afanti oni diris, ke konas aŭguri. Iun tagon Afanti diris ŝerce al la ĉefministro, ke li mortos morgaŭ. La sekvan tagon la ĉefministro falis de

sur ĉevalo kaj efektive mortis. Kiam la reĝo tion eksciis, li ekkoleris kaj tuj sendis soldatojn kapti Afantin.

Poste li kolere demandis: "Afanti, mia ĉefministro mortis pro via aŭguro, do, se vi ne antaŭdiros al mi, en kiu tago vi mem mortos, vi ricevos severan punon."

"Mi bedaŭrinde ne scias tion precize," respondis Afanti. "Mi nur scias, ke mi mortos du tagojn pli frue ol vi."

Aŭdinte tion, la reĝo pensis, ke plej sekure por li mem estus lasi Afantin vivi kiel eble plej longe. Tial li liberigis Afantin.

fonto: http://esperanto.wz.cz/Legolibreto_1.pdf



El ludilo medicina instrumento

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Hipokrato rimarkis, se li alpremas oreilon al la brusto de malsanulo, li povas bone aŭdi batadon de la koro. Dum du mil jaroj medicinistoj nenion ŝanĝis kaj esploris koron kiel li.

Sed en la jaro 1816 profesoro de medicina fakultato en Parizo René-Teophile-Hyacinthe Laënnec ekhavis ideon, kiun donis al li la hazardo. Sur la strato li vidis ludi knabojn kun tubo. Ili frapetante ĉe unu ekstremo sendadis signalon unu al la alia. La

tubo bone kondukis brueton. Laënnec ekmeditis kaj tuj ĉe unua malsanulo volvis tubon el paperfolio kaj aŭskultis per ĝi la koron. Kun surprizo li tre bone aŭdis korbatojn.

Tiam li eĉ ne pensis, ke li inventis unu el plej gravaj instrumentoj de la medicino – stetoskopon.

verkis **Elizabeta Rajtmár**, el Hungario.

fonto: http://esperanto.wz.cz/Legolibreto_1.pdf



Demisiis la prezidanto de TEJO

La 31-an de decembro en Pollando, post aprobo de la nova Strategio 2018-2020 kaj buĝeto, mi legis leteron al la Komitato. "Pensu pri la jeno dum mi legas ĝin: TEJO devas esti platformo por la junulara Esperanto-movado".



Estimataj aktivuloj,

Preter homoj ni estas konstruantoj,

kaj estas inspirige por mi esti kun homoj kiuj tiom sin dediĉas al nia komuna mondotransformiga celo. Estas pro tio ke mi sentas la bezonon danki ĉiujn kiuj plenigas per revoj la mondon, ĉiujn kun kiuj mi kunbatalis kaj ĉiujn kiuj kredis je mi.

Por Esperanto mi decidis agadi antaŭ ol eklerni, kaj al la demando kiun mi aŭdis mil fojojn "Kiel vi sola ŝanĝos la mondon?", nun mi povus senhezite respondi ke mia laboro atingis centojn da miloj da homoj. Ni ne estas solaj; ni komencas per niaj revoj,

kaj ili flamigas la mondon. Ni kapablas ĉion.

Mi kandidatiĝis kiel gvidanto de nia monda organizo ĉar en mia koro fluas deziro je ŝanĝoj, realigemo de ideoj, rekonstruo por alia ebla, por alia enda, estonteco. Tamen, hodiaŭ mi devas fari parentezon kaj entrepreni doloran decidon demisiante kiel prezidanto ĉar, pro personaj kialoj, mi ne povas doni la maksimumon de mi. Ĉi tiu demisio ekvalidos je la fino de la okazanta evento, la 2-an de januaro de 2018.

Mia pasio nur povas kreski. La fokuso pri ŝanĝoj kaj rezultoj restas.

Ni revidos nin en la sekva batalo.

Dankon al vi ĉiuj

Sed memoru: TEJO devas esti platformo por la junulara Esperanto-movado.



Enric Baltasar

EL LA UNUA PARTO - TAŬO



36

Kion vi volas kunpremi,
tion unue etendigu.
Kion vi volas malfortigi,
tion unue tute fortigu.
Kion vi volas neniigi,
tion unue ekflorigu.
Se vi volas preni ion de iu,
unue donu ion al li.
Tio nomiĝas sagaco pri la nevidebla.
La mola venkas la duran.
La malforta venkas la fortan.
La fiŝon oni ne prenu el la profunda akvo.
La prosperigilojn de la regno ni ne montru al homoj.

Rimarkoj de Cezar

Jen la lasta linio en alia germana tradukversio: „Akrajn armilojn oni ne montru al la popolo.“
La fama diro de Laocio, ke la mola venkas la duran, inspiris la nederlandan popmuzikteamon „Bots“ al la konata packanto: „Mola akvo“

Rimarko de Anniespera

En la originala teksto, la vortoj „li qi“ (fonetike) signifas „la plej akraj armiloj“. Vidu ĉe Wang Chongfang:
„Kaj la plej akraj armiloj de la regno
Ne povas esti montrataj al homoj.“

37

TAŬO estas eterna sen farado,
sed nenio restas nefarata.
Se princoj kaj reĝoj komprenas konservi ĝin,

Krom ke ni estas liberaj elekti nian vivmanieron, Mill ankaŭ pensis, ke ni devas esti liberaj en niaj pensoj, kaj diroj. Malfermaj diskutoj estas por la bono de la komunumo ĉar oni tiel povas pridiskuti kaj defendi sian opinion, sufiĉas ke ne okazas perforto. Multaj homoj ne kongruis kun la pensmaniero de Mill, ĉar lia pensmaniero estis tro individua kompare kun la ideoj de Rousseau pri libereco (vidu Turka Stelo #020). Aliaj pensis, ke Mill detruos la etikon de la komunumo.

Mill estis tre radikala pri feminismo, kaj en lia epoko virinoj havis preskaŭ neniun rajton. Pro tio li verkis libron *“La submetiĝo de virinoj”* en kiu li defendis ĉiujn modernajn pensojn kaj rajtojn de nia tempo. Li edziĝis kun Harriet Taylor (li fakte estis ŝia

ĉiuj aĵoj formiĝas per si mem.
Se ili formiĝas kaj leviĝas la avidoj,
mi bridus ilin per sennoma simpleco.
Sennoma simpleco efektivigas sendezirecon.
Sendezireco faras kvieta,
kaj la mondo evoluas per si mem.

Rimarkoj de Cezar

La usona verkisto Charles Bukowski en iu prozpoemo rimarkas, ke li „ŝatas ĉiujn aĵojn, kiuj iras per si mem“. Kiel ekzemplon li nomas ankaŭ ruliĝantajn ludpilkojn kaj sapvezikojn. Unufoje survoĝigita, ili serĉas mem sian vojon. Tiu rimarko celas kompreneble ankaŭ homojn. Homoj, kiuj iras per si mem, kiuj ne bezonas ordonon por agi en la intereso de la homaro, estas por mi tiuj, kiujn ni nepre bezonas, homojn, kiuj nur agas laŭ ordonoj kaj komandoj, ne kapablus krei ordon, en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la bazo por la libera evoluo de ĉiuj kaj ĉio. Ĝuste tion celas ankaŭ Laocio, homojn, kiuj iras per si mem, en mondo, kiu kvazaŭ iras per si mem, sen perforto, sen subigo, en la natura fluo de la evoluado. Kaj tial mi tiom ŝategas tiun grandiozan filozofon, kiu ne simpligis la mondon al nura ekonomia maŝino, kiel tion sufiĉe ofte faris kaj faras iuj polve sekaj ŝajnmarksistoj kaj aliaj ekonomiaj fetiĉistoj, kiuj supozas, ke la brutala subigo de la homoj sub „ferajn“ ekonomiajn leĝojn kaj interesojn nepre necesas por progresi entute. Tute male ni devas adaptiĝi al la leĝoj de la kosmo, ni bezonas universalan vidpunkton, kiu tamen inkludas ĉiun unuopan individuon surtere, tiel, kiel tion instruas jam Laocio, tiukaze irus ĉio kvazaŭ per si mem. Tute en la senco de TAŬO de Laocio. Laŭ liaj principoj ĉiu milito de homoj kontraŭ homoj kompreneble estas fia agado, do tute kontraŭproduktiva kaj nenecesa. Jen sfero, en kiu neagado estus plej ofte multe pli utila ol ĉiu agado.

(daŭrigota)

dua edzo) kiu havis la trajtojn li priskribis en ĉi tiu libro, kaj ili tre multe feliĉiĝis. Mill verkis du librojn: *“Pri Libereco”* kaj *“La submetiĝo de virinoj”* kaj lin helpis sia edzino. Tamen ambaŭ libroj estis eldonitaj post lia morto.

<<<

¹ **utilismo** Φ Doktrino, kiu rigardas la utilon kiel la principon de ĉiuj valoroj aŭ en la tereno de la scio aŭ en tiu de la agado. (PIV)

² **paternalism/o**. Doktrino aŭ konduto, laŭ kiu la mastro sola regas la socialajn fakojn de sia entrepreno, prizorgante siajn dungitojn, kiel patro siajn infanojn. (PIV)

(daŭrigota)

Mallonga Historio de Filozofio (25)




Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

John Stuart Mill (1806-1873)

Imagu ke en via infanaĝo vi estis tute aparta de la aliaj infanoj, kaj anstataŭ ludi kun ili vi estis lernanta la grekan lingvon, algebron kaj vi estis ĉiam parolanta kun gravaj intelektuloj. Do, kia homo vi fariĝus vi pensas? Ĉi tio estas preskaŭ kio okazis al John Stuart Mill. Oni uzis lin kiel objekto de eksperimento. Lia patro, **James Mill**, kiu estis amiko de **Jeremy Bentham** (vidu Turka Stelo #023), pensis ke la cerbo de infano estas "blanka papero", same tiel, kiel pensis **John Locke** (vidu Turka Stelo #017). James Mill kredis, ke se oni edukas infanon bonorde ĝi povas fariĝi geniulo kaj li tiel edukis sian filon. Ĉi tiu ne estis suferiga vivmaniero por lia filo, ĉar li uzis la metodon de **Sokrato** (vidu Turka Stelo #002): Pridemandi ĉion en la vivo kaj provi malkovri la ideon anstataŭ parkerigi ion.



Suprize Mill, kiam li ankoraŭ estis 3-jaraĝa komencis lerni pri la antikvaj grekuloj, kiam li estis 6-jaraĝa verkis historion pri Romio, en la aĝo de 7, li komprenis la dialogojn de **Platono** (vidu Turka Stelo #003) el la originala greka teksto, en la aĝo de 8, li komencis lerni la latinan, en la aĝo de 12, li komprenis historion, ekonomion kaj politikon, li povis solvi komplikajn matematikajn problemojn kaj estis pasia pri scienco. Li estis mirinda knabo. Kiam li estis 20-jaraĝa, li estis unu en la plej famaj pensuloj de sia tempo, sed ĉar li ne kreskis kiel normala infano, li estis iomete stranga kaj sola homo.

Li batalis kontraŭ maljusteco, li estis unu el la unuaj feministoj, li apogis nask-kontroladon, li fariĝis politikisto, ĵurnalisto kaj aparte de ĉio filozofo kaj eble la plej grava filozofo de la 19-a jarcento. Li estis grandinfluenta **liberalisto** kaj defendanto de **utilismo**¹.


Li kun sia familio dum la someroj loĝis ĉe la somerdomo de Bentley. Kvankam en sia teorio Bentley diris, ke taŭga ago alportas la plej altan feliĉon, Mill pensis, ke la teorio de lia instruisto estis iomete ne matura, do li kreis sian propran teorion en kiu li diferencigis inter la superaj kaj malsuperaj

plezuroj. Ĉu vi preferus esti feliĉa porko ruliĝanta en koto kaj daŭre manĝanta aŭ esti malfeliĉa homo? Kvankam tio estis kontraŭ la teorio de Bentham, Mill pensis ke ĉiuj preferus esti en la pozicio de malfeliĉa homo. Li pensis, ke estas diversnivelaĵoj plezuroj en vivo kaj oni ne povas kompari la malsuperajn plezurojn kun la superaj. Estas pli bone esti en la pozicio de malfeliĉa Sokrato ol en la pozicio de feliĉa stultulo, ĉar la kapablo pensi povas alporti pli altkvalitajn plezurojn. La teorio de Bentham estis simpla sed tiu de John estis malsimpla. Kiel oni povas kalkuli la utilojn de tiuj diversaj feliĉoj? Mill neniam montris manieron kalkuli tion.

Mill pensis ke homo similas al arbo, se vi donas al arbo spacon por kreski ĝi iam atingos sian potencon, alie ĝi fariĝos kurba kaj malforta planto. Same estas por la homo, se la homo evoluas bone, tiam la komunumo ankaŭ evoluas. Li rakontis ĉion ĉi en sia libro "**Pri Libereco**". Infanoj ne ŝatas manĝi verdaĵojn sed gepatroj diras, ke tio estas por ilia bono. Do, paternalismo² estas bona por la evoluo de infanoj. Paternalismo estas bona se ĝi estas por la bono de la evoluo de infanoj. Oni devas protekti infanojn kaj kontroli iliajn kondutojn. Sed paternalismo eble ne estas bonvena en civilizaciaj komunumoj ĉar ĝi povas malutili al homoj. Ĉiuj ŝatas vivi libere siajn proprajn vivojn. Sed ĉi tiu ne estis taŭga penso en la Viktoriana epoko, kiam homoj kredis ke la ŝtato devas instrui etikon al la popolo. Mill ne nur maltraktiviliĝis pri tio, kion la ŝtato alturdis al la popolo sed ankaŭ pri la "tiraneco de la plimulto" aŭ la "socia premo" sur homoj, kio malutilas al ili.

Aliuloj ne povas scii tion, kio alportos al vi feliĉon. Tion nur vi povas scii. Kaj eĉ se tion vi ne scias, anstataŭ konformi al ununura vivmaniero estus pli bone ke vi faru viajn proprajn erarojn kaj lerni el ili. Mill kredis je individua libereco kaj tio estis konforma kun sia teorio pri utilismo. La intelektuloj bezonas eĉ pli grandan liberecon por evoluigi sin, do ili kutime ŝajnas ekscentraj. Se ni malhelpas ilin, tiam la tuta komunumo estas malhelpata. Ni lasu, ke homoj decidu pri iliaj vivmanieroj kaj vojoj, sed kompreneble dum ili faras tion, ili ankaŭ ne devas malhelpi la aliajn.

Sed estas aliaj punktoj en la teorio de Mill, kiuj estas ĝenigaj. Ekzemple se iu ebriulo, kiu havas neniun parencon, trinkas ĉiutage ĝisfunde, ĉu oni devas haltigi lin? La respondo de Mill estas '**Ne**'. Vi povas diskuti kun li la aferon sed se li ne malutilas iun ajn li devas esti libera daŭrigi tion, kion li volas. Tamen, se li havis infanon tiam, tio ne povus esti lia libera volo.



(17)

En la terorista loĝejo, tri viroj ĵetis al si reciproke vortaĉojn.

“Sufiĉas!” aŭtoritatis la Unua. “Mi plu surhavas la uniformon.”

“Vi jam devus esti for de longe,” la Dua malkontentis. “Mi ne komprenas viajn strangajn ideojn.

Normale vestita, en veturilo, vi jam estus ekster ĉia danĝero, ke polico kaptus vin...”

“Kun gardista uniformo, vi estos tuj rekonebla,” aldonis la Tria, same aĉ-voĉe.

“Ĝuste ne. Uniformulon sur biciklo ĉiuj vidas, sed memoras neniu. Nu, mi estas la ĉefo, kaj sufiĉas kun tiu ĉi diskuto. Montriĝas, ke vi ne povas kompreni, sed tio nenion ŝanĝas. Mi ne akceptas pluan diskutadon.”

“Uniformo! Ili ne povas kompreni”, li plu pensis, dum streĉa silento ekpezis en la ĉambro. Li ĉiam havis fortan amon al uniformoj. Jam kiam li estis nur dekjara, kaj lia dudekjara frato revenis hejmen soldate vestita, li sentis egan admiron, kiun ne vere ĝenis la fakto, ke tiu frato konstante parolis pri li plej malestime. Kaj kiam tiu fariĝis policisto, kiel bela li aspektis en sia uniformo! Li plu alparolis la frateton de alte, kvazaŭ ĉi-lastata estis io fuŝita de la naturo, kaj tio kolerigis la knabon, sed en la koleron kiom da admiro enmiksiĝis! Kaj kun la admiro venis dezirego foje montri al la frato sian valoron. La pliaĝulo trovadis plezuron en la arto, kiun li pli kaj pli perfektigis, ridindigi la frateton, sed tio nur fortigis en la knabo la volon sekvi la vojon de la frato, por iutage povi diri: “Rigardu. Mi ne estas neniulo. Ankaŭ mi havas uniformon. Kaj oni trovas min pli bona ol vin.”

Sed pro iu fuŝo, kiun kapdoktoro priskribis malhoneste, la pli juna frato ne restis longe soldato. La polico malakceptis lin, ĉar li estis iom tro malalta. En la ekzameno por fariĝi fervoja kontrolisto li malsukcesis. La dogana servo rifuzis lin nejuste, ricevinte raporton pri lia sinteno dum la tempo soldata. Kaj tiam lian fraton policiston mortigis iu aĉulo... Nun, kiam li havas belan uniformon, kaj plenumas konstante grandfarojn, kiuj igas la mondon paroli pri li, kaj lin senti sin grava, oni ne forprenu de li la plezuron trabicikli la regionon uniforme!

Estas mirinde, kiom oni povas esprimi senparole. Dum la Unua perdiĝis en siaj memoroj kaj konsideroj pri uniformoj, la Dua kaj Tria rigardis sin reciproke kaj interŝanĝis per la okuloj, fojfoje helpataj de diskreta manmovo, ideojn plej interesajn.

Kiam la ĉefo videble eliĝis el sia dolĉa-maldolĉa baniĝo en silenta pensado, la Dua ekparolis:

“Mi pripensadis, dum vi restis longe senparola, kaj finfine mi ŝanĝis mian opinion. Aperas nun al mi, ke vi pravas. Sur biciklo, kun gardista uniformo, vi estos malpli rimarkebla.”

“Jes,” aldonis la Tria, “ankaŭ mi nun samopinius. Krome, la fakto, ke ne tuj vi forkuris, helpas. Eĉ polico serĉanta vin ne zorgos pri gardisto malrapide biciklanta tiel malfrue post la okazaĵoj. Nun, kiam via vizaĝo estas tute senhara, vi ne plu similas viajn fotojn. Kaj ĉar neniu povas suspekti, ke vi havas uniformon...”

“Vi estas certaj, ke vi mortigis tiun ulon, kiu provis min haltigi ĉe la eliro el Plinov?”

“Jes, tute certaj. Ne havu zorgojn pri tiu.”

“Bone. Nu, ĉio nun estas en ordo. Mi tuj forbiciklos. Vi konas viajn devojn pri la sekvo. Agu precize laŭ ili. Mi fidas vin. Ĝis!”

Li ne estis for de tre longe, kiam la Dua ektelefonis:

“Polico, ĉu? Mi vidis la teroriston, kies foto troviĝas ĉie en la lando. Li surhavas gardistan uniformon kaj trankvile biciklas. Direkte al la maro, ŝajnas al mi. Antaŭ kelkaj minutoj li pasis preter la Centra Teatro. Atentu, li ne plu havas eĉ unu haron sur sia vizaĝo, sed eĉ tiel li estas plene rekonebla.”

“Bone,” diris la Tria. “Nun ni rapide transiru al la kaŝejo, kiun li ne konas. Finfine ni estos senigitaj de tiu ulo, kiu fariĝis pli kaj pli danĝera kun siaj uniform-insisto kaj nekapablo konsideri la realon.”

Dume, en la policejo, la juna viro, kiu ĵus refermis la telefonon, deklaris sin senkomprena:

“Imagu! Se lia informo estas ĝusta, li rajtas ricevi multegon da mono, kaj li eĉ ne diris sian nomon, aŭ de kie li telefonas. Homoj fariĝas strangaj, kiam ili rilatas kun la polico.”

(daŭrigota)

Legu artikolojn de nia Kultura Paĝo:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/kultura-pago/>



Ekstersunsistemaj planedoj

Je la fino de la dudeka jarcento nia bildo de la sunsistemo estis pli malpli kompleta. En la mezo troviĝas la Suno kaj ĉirkaŭ tiu rondiras diversaj planedoj kaj pli etaj objektoj. Tio ne signifis tamen, ke la serĉado al novaj planedoj haltis. En la naŭdekaj




La planedoj de nia Sunsistemo, konataj ekde la naŭdeka jarcento

jaroj la unuaj planedoj estis malkovritaj ekster la sunsistemo. Same kiel pluraj sciencistoj ekde la sepdeka jarcento, kiuj jam kuraĝis filozofiumi pri tio, oni ankoraŭ ne havis taŭgajn instrumentojn por rekte

Pulsarmezurado

Nur kiam temas pri tre proksima stelo, kies planedo havas precize taŭgan orbiton, oni povas per la plej bonaj teleskopoj distingi la du objektojn. Tio ne estas praktika kaj certe ne eblis dum la naŭdekaj jaroj.



Modelo de pulsaro. La pilko en la mezo estas la kerno. La blankaj linioj montras la magnetan kampon kaj la bluj konusoj estas la radio kiun la objekto elsendas.

Anstataŭe oni povas pensi pri kiel ekzakte la planedo influas la stelon kaj kiel oni povus mezuri tiun influon. Tre taŭgaj steloj por fari tion estas pulsaroj, pro iliaj ekstremaj fizikaj kvalitoj.

Pulsaroj estas la restaĵoj de mortaj steloj, kies kernoj implodis. Ili estas tre densaj objektoj kun la maso de kelkaj sunoj, koncentritaj en kerno de kelkaj kilometroj. Laŭ la leĝo de konserviĝo de angula movokvanto, turnanta objekto iras pli rapide kiam la maso moviĝas al la akso. Tial dancisto povas turni sin pli rapide per premi la brakojn kontraŭ la korpon. Por pulsaroj tiu efiko estas tiom forta, ke ili rotacias milojn da fojojn ĉiusekunde.

Pulsaroj havas ankaŭ tre fortan magnetan kampon kaj elsendas intensan radion tra du konusoj. La akso de tiuj konusoj ne ĉiam kongruas kun la akso de rotacio, kio signifas ke la konusoj de radio tre rapide rondiras. Kiam observanto troviĝas en la konuso, oni nur estas trafata de tiu radio dum parto de rotacia periodo, kio signifas ke oni vidas pulsantan stelon. Tiu kvalito estas la kialo ke oni nomas tiajn stelojn pulsarojn.

La rotacio de pulsaro estas tre rapida kaj la ritmo estas komparebla al atomhorloĝo. Tio signifas ke eĉ se planedo nur iomete influas la pulsaron, tio videblas kiel ŝanĝo en la ritmo. Tio estas precize kiel oni trovis la unuaj du konfirmitajn ekstersunsistemajn planedojn en 1992. La ideo malantaŭ tiu malkovro estas ke ne nur la stelo tiras la planedon gravite, sed ankaŭ la planedo tiras la stelon. Kompreneble la stelo havas multe tro da maso por rondiri la planedon, sed ĝi ja iomete moviĝas. Kiam la planedo tiras la pulsaron antaŭen, la pulsaro do estas pli proksima al ni, ol kiam ĝi tiras ĝin malantaŭen. Oni scias ekzakte kiom rapida lumo estas, do oni povas kalkuli kiom pli longa ĝi devas vojaĝi depende de la pozicio de la pulsaro. Per mezuri kiom la ritmo ŝanĝiĝas, oni povas do kalkuli kiom la pozicio de la stelo ŝanĝiĝas. Per tiuj informoj oni povas konfirmi la ekziston de planedo kaj lerni multe pri la maso kaj orbito de la planedo.

Pulsarmezurado estas efika metodo por trovi ekstersunsistemajn planedojn, sed pulsaroj mem estas maloftaj objektoj. Por trovi vivon, la planedoj estas tute senutilaj, ĉar nenio povas travivi la morton de la stelo, aŭ la fortan radion de la pulsaro. Kiam temas pri planeda formado kaj la evoluo de steloj, la planedoj estas interese tamen, ĉar ili eble povus rezulti de dua rondo de planeda formado. Tio signifus


ke ili ne kreiĝis dum la komenco de la sunsistemo, kiel la planedoj en nia sunsistemo, sed ke ili formiĝis kiel rezulto de la reordiĝo de materio dum la fino de la vivo de la stelo.

Radia rapido

Alia metodo por detekti la gravitan tiron de planedoj estas per radia rapido. Tiu teĥniko havas la avantaĝon ke ĝi funkcias por steloj kiel nia Suno, sed mezuri la efikon estas multe malpli facila. Por kompreni kiel la teĥniko funkcias, gravas unue kompreni lumon.

Preskaŭ ĉiujn astronomiajn datumojn kiujn oni mezuras rilatas al la lumo de steloj. Tial la influo de la planedo je la lumo de la stelo estas la ŝlosilo al trovi la planedon. Lumo estas ondo kaj havas specifan ondolongon, kiu korespondas kun la koloro, aŭ energio, de la lumo. Steloj elsendas preskaŭ ĉiujn kolorojn, kiuj kune fandiĝas kaj kreas blankan lumon. Kiam oni poste apartigas la lumon por vidi la kolorojn el kiuj ĝi konsistas, oni konsistas tamen ke kelkaj koloroj mankas. Tio estas pro tio ke elementoj en la stelo absorbas specifajn ondolongojn. La manko de tiuj koloroj videblas kiel nigraj bendoj sur la kolorspekto de la stelo, kiujn oni nomas liniojn de Fraunhofer. Se oni kombinas tiun kvaliton de lumo kun alia efiko, oni povas ekzakte mezuri la rapidecon de la stelo laŭ onia vidlinio.

Kiam la fonto de ondoj moviĝas antaŭen aŭ malantaŭen, la ondolongo de la ondo ŝanĝiĝas. Tio estas kial la sonorilo de ambulanco sonas pli alte kiam ĝi alproksimiĝas, sed malalte post la preteriro. Tiu




La linioj de Fraunhofer

efiko nomiĝas la Doppler-efiko kaj respondecas pri tio ke steloj estas iomete pli ruĝas kiam ili moviĝas for de ni kaj iomete pli bluaj kiam ili alproksimiĝas. Objekto devas iri nekredible rapide por rimarki la efikon nudokule, sed sciencistoj povas pli kaj pli precize mezuri.

Per kompari la liniojn de Fraunhofer inter la lumo de la stelo kaj

tiuj de tipa stelo, oni povas mezuri kiom rapide la stelo moviĝas kaj, kio plej gravas, ĉiu tiu rapideco ŝanĝiĝas. Se la stelo tre ritme rapidiĝas kaj malrapidiĝas, tio montras ke verŝajne iu planedo ĉirkaŭiras tiun stelon. Pere de la ekzaktaj kvalitoj de tiu ritmo oni povas eĉ kalkuli kiom da maso la planedo havas kompare al la stelo, kiom rapide ĝi ĉirkaŭiras la stelon kaj kian distancon ĝi havas ĝis la stelo. Tio instruas al ni multe pri kiom diversaj planedoj povas esti. Ekzemplo de tio estas la varma Jupitero, planedoj kiuj same grandas kiel Jupitero, sed kiuj ĉirkaŭiras la stelon tiom proksime kiel Merkuro. Io tia ne ekzistas en nia propra sunsistemo, do oni demandas sin ĉu la planedo formiĝis tie, aŭ ĉu ĝi malrapide moviĝis pli proksimen al la stelo.



La unua planedo malkovrita ĉirkaŭ stelo simila al la suno. La horizontala akso montras la fazon de la ondo laŭ tempo kaj la vertikala akso montras la rapidecon de la stelo.

Transitoj

La koncepto de transitoj aŭ pasado estas la plej intuicia, ĉar oni bone konas ĝin el nia propra sunsistemo. La du planedoj kiuj troviĝas inter la Suno kaj la Tero, Venuso kaj Merkuro, fojfoje pasas antaŭ la diskon de la Suno. Tiam ili videblas kiel etaj nigraj punktoj antaŭ la helega Suno. Ni ankaŭ povas observi tiajn pasadojn ekster la sunsistemo, sed pro tio ke ni ne vidas tiajn stelojn kiel diskojn, oni ne povas vidi la planedon kiel punkto. Anstataŭe oni mezuras la helecon de la stelo tre precize, por vidi ĉu la planedo absorbas iom da lumo.

Ĝenerale la heleco de stelo malkreskas je multe malpli ol 1%. Tio signifas ke oni bezonas tre bone mezuri por



Pasado de Venuso, la plej proksima planedo en nia sunsistemo.

vidi eĉ ajnan influon. Aldone ekzistas multe da aliaj aferoj kiuj povas influi la helecon de stelo, kiel gasuboj. Por certigi ke la efiko kiun oni mezuras estas de planedo, oni devas do atendi dum longan tempon kaj vidi ĉu la heleco malkreskas periodike. Tiel oni tuj scias kiom da tempo la planedo bezonas por ĉirkaŭiri la stelon, do kiom longa jaro sur tiu planedo daŭras. Pro tio ke la longo de la jaro dependas de la averaĝa distanco al la stelo, oni povas kalkuli kiom for la planedo estas kaj kiom varma ĝia surfaco povus esti. Finfine oni povas konkludi ĉu la planedo havas atmosferon aŭ ne. Tio estas pro tio ke atmosferoj blokas la lumon grandiente, kvankam ŝtono blokas la lumon tuj.

Transitoj estas uzataj tre ofte por serĉi eksternsunsystemajn planedojn. La metodo estas taŭga


por steloj kiel nia suno kaj tre facile farebla. Kosmaj sondiloj kiel KEPLER povas observi la helecon de multaj steloj samtempe. Tiel oni povas preskaŭ certi pri tio ke unu el ili havas planedon. Tio igas la metodon nekredeble efika kaj la plej populara metodo en la moderna astronomio. Ne estas surpriza do ke tiom da eksternsunsystemaj planedoj havas "KEPLER" en la nomo.

Kial serĉi eksternsunsystemajn planedojn?

Por tiuj, al kiuj la pura scivolemo ne sufiĉas, la esplorado de eksternsunsystemaj planedoj instruis al omi amason da novaj scioj pri nia sunsistemo kaj aliaj. Rigardi aliajn stelojn povas montri al ni ĉu la kondiĉoj en nia sunsistemo estas kutimaj kaj vaste troveblaj, aŭ tre maloftaj. Oni ekkonas novajn specojn da planedoj, kiel tiuj kiuj estas tute kovritaj de akvo, aŭ kiuj konsistas plejparte el karbono kun travoloj el diamanto. Oni lernas pri planedoj kun strangaj orbitoj kiel varmaj Jupiteroj, planedoj kiuj estas frostitaj dum parto de la jaro kaj varmegaj dum alia parto, kiel kometoj, aŭ planedoj kiuj ĉirkaŭiras du stelojn samtempe. Scii pli pri tiuj planedoj estas interesa el si mem, sed ankaŭ por onia pli ĝenerala kompreno de la universo, eksternsunsystemaj planedoj povas esti gravaj. Pensi pri la ekstremaj cirkonstancoj sur aliaj planedoj helpas nin kompreni la formadon de planedoj pli bone kaj helpas nin pensi pri kiel distancaj atmosferoj kaj eĉ vivo povus aspekti. La fako estas ankoraŭ juna tamen kaj restas abundeco da nekredeblajn sciindaĵojn kiujn ni ankoraŭ malkovru.

verkis **Frank van Hertrooij**, el Germanio

Fonto : <https://scivolemo.wordpress.com/2018/01/03/casi-planedojn/>



La heleco de la stelo dum la planedo pasas

Iom pri vortkunmetado

En Esperanto ni riĉe kreas novajn vortojn per la kunmetado de du (aŭ pli da) jam ekzistantaj vortoj, ekzemple el "tablo" kaj "tuko" ni kreas la novan vorton "tablotuko".

Estas komprenebla, ke ekzistas reguloj por fari tion. Tiuj reguloj estas Aŭ naturaj reguloj, Aŭ ĝenerallingvaj reguloj, Aŭ specialaj reguloj de la Esperanta gramatiko, Aŭ reguloj ĉar Esperanto apartenas al speciala grupo de lingvoj.


Ekzemplo de natura regulo estas, ke la nova nocio devas ekzisti en nia menso, ĉar ni ne povas fari

vorton kia "muronklo"; kvankam ni havas en niaj mensoj la nociojn "muro" kaj "onklo", ni ne havas noción kiu kombinas tiujn du bazajn signifojn. Oni povas fari centojn da miloj de tiaj neeblaj vortoj.

Ekzemplo de ĝenerallingva

regulo estas, ke la vorto devas ne esti tro longa nek tro mallonga: tial ne eblas krei longegan kunmetaĵon por la malsano "aids" nek vorton el personaj pronomoj, kia la "lifamilio" por la familio de li.

GRAMATIKO



Ekzemplo de Esperantgramatika regulo estas, ke se la vorto estas substantivo, ĝi devas finiĝi per “-o”; ne eblas la substantivo “(la) boatantaŭ” por la boatantaŭo, la antaŭo de la boato.

Ekzemplo de la speciala lingvogrupo en kiu estas Esperanto, estas ke ni ne povas krei la vorton “paŝdedu” por “dupaŝo”, pas de deux.

Ĉi tiu speciala lingvogrupo por fari novajn vortojn nomiĝas la aglutinaj lingvoj. Ili estas krom Esperanto la ĝermanaj lingvoj, kiuj lastaj, kompreneble ĉar etnaj, permesas esceptojn al sia kunmetado. Jen la reguloj de tia vortkreado per kunmetado. **Unue** la du bazaj elementoj devas esti kunfanditaj en unu vorton, kvazaŭ en novan radikon, kaj la ĉefelemento devas, antaŭ la finaĵo, veni laste, do malantaŭ la flankelemento. En la vorto “tablotuko” la ĉefelemento estas “tuko”, ĉar la afero estas tuko, ne tablo. Ĉar la kunmetaĵo estas kvazaŭ nova radiko, oni ne povas meti inter la elementojn ion ajn, do ne streketon, nek kategorian finaĵon, nek afikson, nek pluralan aŭ akuzativan finaĵon. Zamenhof faris unu escepton: malfacile prononceblaj kunmetoj rajtas intermeti la sign signifan literon “o”, kiel en “postosciigo” por postosciigo, aŭ “panelolaboro” por panellaboro kiu lasta sonas kvazaŭ “panelaboro”. **Due** la ĉefelemento tenas sian normalan akcenton, kaj la antaŭa akcento de la flankelemento fariĝas duagrada akcento. **Trie** la flankelemento havas la signifon de prepozitivo (aŭ kelkfoje adverbo aŭ predikativo), kaj kie necesa la prepozicio povas enteniĝi en la nova kunmetaĵo: “subteromino”. Sen la mencio de la prepozicio la signifo de ĉi lasta restas en la signifo de la nova kunmetaĵo. Kaj **kvare** aldoniĝas al la signifo de la kunmetaĵo la signifo de specialeco. Do “tablotuko” ne estas ĉia tuko, sed speciala, speciale uzata aŭ fabrikita por uzi sur tabloj. Sen tiu signifero de specialeco la nova vorto ne havas ekzistoraĵon, kvankam ĉe kelkaj afiksoj ne estas facile malkovri ĝin.

Esperanto estas la plej aglutina lingvo el ĉiuj, ne nur ĉar ĝi strikte obeas la regulojn, escepte de kelkaj Zamenhof’aj esceptoj, sed precipe ĉar ĝi, pro Zamenhof, uzas pli da specoj de aglutina vortkunmetado ol la etnaj lingvoj. El ĉi lastaj la angla estas la malplej konsekvenca ĉar ĝi “inventadis” plurajn iomete ne komplete aglutinajn variaĵojn. Tio faras tiun lingvon eĉ pli ĥaosa ol ĝi jam estas, por neangloj. La precipa speco de vortfarado, en la etnaj lingvoj preskaŭ la nura, estas la kunmeto de du substantivoj, aŭ de substantivo (el prepozitivo) kun kia ajn ĉefelemento, kiel en “la bestoĝardeno, pafilmortigi, infantaŭga, kaj kuglorapide”. Kelkaj aliaj, speciale Esperantaj, specoj de kunmetado estas: unue

adjektivoj kaj adverboj, nure, el substantivo kun sia adjektivo aŭ de verbo kun sia adverbo aŭ gramatika objekto, kiel en “frumatena” kaj “rapidkure” kaj “monhava”. Due verboj kaj adjektivoj kaj adverboj el prepozitivoj, kie oni kutime metas la ĉefelementon, la prepozicion, en la komencon, pro klareco, kiel en “surmonta; senmoni, transmara”. Trie verbo kun prepozitiva prepozicio, kiel “Enloĝi dometon” el loĝi en dometo. Kvare numeralo malpli granda ol la sekvanta, ĉefelementa, numeralo, kiel “centmil kaj kvardek” el cent miloj kaj el kvar dekoj. Kaj kvine la pseŭdoprefiksoj kaj la pseŭdosufiksoj, kiel “ekiri” kaj “manĝilo”.

Sed ĉe kunmetado ekzistas la problemo, ke la homoj kelkfoje, pro nekoscio, forgesas pri la reguloj. Unu grava forgeso estas, ke la determinanto havu prepozitivan funkcion, ekz. “por tabloj”. Ankaŭ la etnaj lingvoj faras kelkfoje tiajn erarojn. Temas precipe pri la jenaj tri kunmetaĵoj, kiuj ne permesatas ĉar mankas la obeo al la menciita regulo. La unua tia neeblaĵo estas la kunmeto de verbo kun sia rekta objekto. Manĝi fiŝojn ne povas fariĝi “fiŝmanĝi”, ĉar “fiŝojn” ne funkcias kiel prepozitivo. Same pri verbo kun sia adverbo, kaj do ne eblas “Mi rapidkuris”. Nek pri substantivo kun sia adjektivo, kiel la “ruĝrozo”, nepermesata ĉar mankas la nocio de specialeco. Por ne ruinigi Esperanton la famaj verkistoj de la “Plena Analiza Gramatiko”, Waringhien kaj Kalocsay, forte avertis la Esperantistojn kontraŭ la supre menciitaj falsaj kunmetaĵoj. Vi trovos tion ekzemple en \$ 423 sur paĝoj 510 kaj 511 kaj speciale 512, ekz. “Se oni allasus ankaŭ alian vortefikon, adjektivigan, ĉio estus en danĝero, la tuta konstruaĵo ekŝanceliĝus, ĉio fariĝus malcerta kaj malfirma”. Ni do ne faru tiajn kunmetojn, nek uzu tiujn faritajn de aliuloj, kaj nur uzu, se vi nenecese volas, tiujn kelkajn kreitajn de Zamenhof, kiaj dikfingro kaj alternejo (= universitato) kaj fremdlando.

Marcel Leereveld.

Fonto: **Aŭstralia Esperantisto #346**



PMEG
Plena Manlibro de
Esperanta Gramatiko

Legu libere ĉe:
<http://bertilow.com/pmeg/>

TRAIRADO

Dum la vojaĝo de l' vivo
multaj estas trompitaĵ
de la ruzeco de l' pado,

Ĉar la vojo estas longa:
ĉiam transiranta supren,
ĉu oni volas aŭ ne.

Tamen, vojeto mallonga
estas negrava detalo,
kvazaŭ tranĉo de l' sorto.

Oni bezonas trairi
la tutaĵon de la vojo;
ĉu en sonĝoj de flugo,

aŭ eble inter la dornoj,
kiuj minacas l' irejon.

Pasaĝeroj de l' eterno,
ni estas vagantaj lumoj,
al ĉiel' aŭ infer' strebe.

EVA

Edena ĝardeno:
scenejo de l' falo
de Adamo kaj Eva,
ambaŭ delogataj
per la ruzeco de Malbono,
kiu ĉiujn povigas.

Nu, vi diros,
vanfilozofie,

(kvazaŭ Sartre):
la serpento
estas aliaj,
kiuj kulturas
la florojn de l'
Malbono,
kaj la mondon
premas
ekde ĉiam.

Dume, mi priatentas
la serpenton,
kiu tamen dormetas
en iu malluma
angulo ene de mi.

verkis **Maria Nazaré Laroca**,
Juiz de Fora, Brazilio



VERSOJ IRONIAJ - Poemoj de komencantino

Nurarıklı el Turkujo

**1
GRANDA AMO**

Frapis nin en 1990,
Forgesiĝis en 1997,
Ĉar niaj celoj
Sanĝiĝis en sep jaroj.

**2
PRI HOMARO**

Ni amas homaron,
Sed homaro
Amas sian monujon!

**3
EKZAMENO**

lun nokton, Napoleono,
Dum milito, en sia tendo,
Timigita en ŝvito,
Demandas:
"Ĉu mi estas en ekzameno?!"
"Ne", respondas liaj viroj,
"Ni estas en milito,
Nia imperiestro!"
"Tiam Bone!"
Kaj li reen endormiĝis pace...

**4
MENSOGOJ**

Li diras ke estas malvarme

En Dubai en somero !
Kaj diras ke li fordonis al sia
servanto
sian plumon el solida oro!
Kia mensogo!

**5
MILITOJ**

Estas tro da militojn en la mondo.
Sed legi estas paca.
Legi pri militoj
Nur en libroj,
Komence per
"Milito Kaj Paco",
La plej legita libro de ĉiuj tempoj.
Kiu kuraĝus traduki ĝin
al Esperanto !

verkis **Nur Bilimer Arıklı**,
el Turkujo



NEĜA HOMO

Elena Popova el Bulgario

NEĜA HOMO

Belega estis
la Neĝa homo
en siaj vestoj.
La infanoj festis.

Tage la suno
ĝin kisis senĉese
kaj ĝi ekploris,
ploris, ploris...

La Neĝa homo
ankaŭ havas koron...

verkis **Elena Popova**,
el Bulgario





Tekrar merhaba,

Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı kitaptan kursumuza devam ediyoruz .

Derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın

çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanılıyor.

LA MONATOJ

lun tagon, kiam la infanoj alvenis al la lernejo, Fraŭlino Saĝa diris:

"Hodiaŭ vi lernos la nomojn de la monatoj. Kiom da monatoj estas en la jaro, Ŝila?"

"Estas dek du monatoj en la jaro," respondis Ŝila.

La instruistino ekprenis pecon da kreto, kaj skribis sur la nigra tabulo:

januaro	majo	septembro
februaro	junio	oktobro
marto	julio	novembro
aprilo	aŭgusto	decembro

"En kiu monato vi naskiĝis, Roĝero?" demandis la instruistino.

"En februaro," respondis Roĝero.

"En kiu monato vi naskiĝis, Ŝila?"

"En aprilo, Fraŭlino."

"Kaj vi, Johano?"

"Ho, mi? Mi naskiĝis en majo, junio, julio, aŭgusto, sep..."

"Ho, ne, Johano. Tio estas ne-eblo... Roĝero, kiom da semajnoj estas en monato? Ĉu vi scias?"

"Jes, mi scias. Estas kvar semajnoj en monato; sed estas kvindek du semajnoj en jaro."

"Bone! Kiom da tagoj estas en unu semajno, Ŝila? Ĉu vi scias?"

"Jes, mi scias. Estas sep tagoj en semajno. Ili estas dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo kaj sabato."

"Roĝero! Ĉu vi scias kiom da horoj estas en tago?"

"Jes, mi scias. Estas dudek kvar."

"Johano, Ĉu vi scias kiom da minutoj estas en unu horo?"

"Ne, mi ne scias tion. Estas tro malfacile."

"Estas ĉiam sesdek minutoj en unu horo, Johano," diris la instruistino bonkore. "Ŝila, ĉu vi scias, kiom da sekundoj estas en unu minuto?"

"Jes, mi scias tion. Estas sesdek."

"Mi skribos tion sur la nigra tabulo," diris Fraŭlino Saĝa.

Ŝi skribis dum kvin minutoj. Tiam ŝi turnis sin.

"Ho, Johano, kion vi faras???"

Johano jam rompis la horloĝon!

"Kion vi faras, Johano?" demandis Fraŭlino Saĝa kolere.

Johano ekploris. "Mi serĉis la etajn horojn kaj la etajn minutojn kiuj loĝas en la horloĝo," diris li, plorante. "Mi imagis ke la horoj estas la gepatroj, kaj la minutoj estas la infanoj, kaj ke ili loĝas en la horloĝo. Mi malfermis la pordon de ilia dometo, kaj ĉiuj el-flugis. Mi ne povas trovi iun ajn."

"Ho, Johano, vi ne estas tre saĝa. Vi estas stultega! Horoj kaj minutoj ne estas bestoj! Sed ne ploru! Mi povas ripari la horloĝon."

Sed Johano ploradis tre laŭte.

"Kuru hejmen al via patro," diris la instruistino, bonkore.

Kaj Johano tion faris, gaje!

* * *

Kaj nun ni devas adiaŭ-i al la musidoj kaj iliaj gepatroj. Adiaŭ, Musidoj! Adiaŭ Musoj!

FINO

Sözlük		julio	Temmuz	sabato	Cumartesi
aprilo	Nisan	junio	Haziran	sekundo	saniye
aŭgusto	Aĝustos	lundo	Pazartesi	semajno	hafta
bonkore	iyi kalplilikle	majo	Mayıs	septembro	Eylül
decembro	Aralık	mardo	Salı	serĉi	aramak
dimanĉo	Pazar	marto	Mart	stulta	aptal
ekflugi	aniden uçmaya başlamak	merkredo	Çarşamba	stultega	çok aptal
elflugi	dışarı uçmak	minuto	dakika	turni	çevirmek
en kiu	ki içinde...	monato	ay (takvim)	vendredo	Cuma
februaro	Şubat	naskiĝi	doĝmak		
horo	saat	neebla	mümkün olmayan		
imagi	hayal etmek	novembro	Kasım		
januaro	Ocak	oktobro	Ekim		
jaro	yıl	ploradi	ploradi		
ĵaŭdo	Perşembe	plori	aĝlamak		

Esperanto Prezento en Kozmos Yazılım Anadolu Lisesi

En la 27-a de decembro 2017 ni prezentis Esperanton al la lernantoj de Kozmos Yazılım Anadolu Lisesi lernejo en Avcılar distrikto de Istanbul. En la prezento ĉeestis ĉirkaŭ 150 gelernantoj kaj iliaj geinstruistoj. La prezento daŭris iom pli ol unu horo. Laŭ peto de lernantoj eble okazos 4-leciona rapida Esperanto kurso en la monato de februaro.



Klasika fromaĝkuko el soj-jogurto, biskvitoj kaj marmelado el framboj - Veganarto

Saluton amikoj, post iom da ripozado mi revenas kun ĉi bongustega kaj tre facila kuko. Temas pri la klasika fromaĝkuko kun marmelado en la supro. Ĝin ni povas tre rapide fari kvankam eble kelkajn ingrediencojn oni devus trovi en specialaj lokoj kiaj agaragararo (vegetaĵa alg-devena gelateno). Mi rekomendas ĝin ankaŭ okaze de datrevenoj :)

Ingrediencoj:

- 12 biskvitoj (Maria-stilaj biskvitoj)
- 50 gr da centprocenta vegetaĵa margarino
- 3 etaj jogurtoj el sojo aŭ 150 gr.
- 1 taso da vegetaĵa lakto
- 1 kulero da agaragararo pulvorigita.
- 3 supkuleroj da citronosuko
- Marmelado el framboj aŭ fragoj.

Paŝoj:

Unue ni devas krei la bazon de nia fromaĝkuko. Por tio varmigu la margarinon kaj pulvorigu bone la biskvitojn. Miksu ambaŭ kaj kirlu ĝis plena sameciĝo. Disfaldigu ĝin en la bazo de ronda muldilo (mi uzis 22centimetran muldilon).

Sekve varmigu la tason da vegetaĵa lakto kun la kulero da agaragararo kaj lasu surfajre ĝis ekbolo. Dume movetu ĝin konstante. Elfajrigu, aldonu la



jogurton kaj la citronosukon, movu bone kaj metu en la muldilon.

Lasu ĝin malvarmiĝi kaj la miksaĵo el lakto kaj jogurto malmoliĝos pli malpli post 30 minutoj. Prenu la marmeladon, movu ĝin energie kaj per ilo (ĉu spatelo, ĉu kulero) kovru la supron de nia fromaĝkuko kaj lasu ĝin malvarmiĝi iom pli.

Kaj jen ĉio! Nia kuko estas preta! Bonan apetiton!

Fonto: <http://veganarto.net/klasika-fromagkuko-el-soj-jogurto-biskvitoj-kaj-marmelado-el-framboj/>





Ululararasi

ANA DIL GÜNÜ

21 Subat 2018



Ululararasi **Esperanto** dilini kullanasak
dunya da dilsel ve kulturnel cesitliliĝe
saygi ve destek gosteriyoruz.

Diller hakkinda: www.lingvo.info Ululararasi ilertisim hakkinda: www.esperanto.net | www.uea.org



Solvo de la krucvort-enigmo

12	P	R	O	T	O	K	O	L	O	
11	O		I	S	M		R	A	N	O
10		A	R		R	O		T	A	R
9	O	N	O		O	N	T	A		A
8	T	R	E		F	A	R	B	L	O
7	L		T	R	O	G	A		L	A
6	U	O			D	R	A	K	O	
5	P	I	R	O	N	O			T	N
4	A	B	E	L	O		L	O		E
3	T	A	L	I		N	O	R	A	B
2	A	R	O	M	O		V	A	R	A
1	K	A	T	A	R	O		K	E	R
10	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10